



4\*89=133\*

# STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO





# ...el Pollando

14-jara pola komencanta esperantistino, lernantino de elementa lernejo interesigas pri sporto, muziko, turismo, laboro, kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn, fotojn, ŝatas multe vojaĝi, ekakursi, legi, rigardi televidon, auskulti radion, danci, kanti, volus korespondi kun gee-istoj el Kanado, Germanio, Francio, Usono, Brazilo, Australio, Sovetunio, Britio, Hispanio, Italujo, Bulgario, Svedio, Svislando, Japanio, Ĉinio, Hungario, Ĉeĥoslovakio. Adreso: Edyta Martyn, 63-900 Rawicz, ul. XX-lecia PRL nr. 39, Pollando.

26-jara instruistino interesigas pri turismo, literaturo, filmo kaj musiko, iam si ludas pianon, si tre ŝatas vojaĝi. Adreso: Beata Mazur, Twardorzeczka 88, 34-324 Lipowa, woj. bielskie, Pollando.

27-jara sukeristo interesigas pri turismo, literaturo kaj filmo, kolektas bildkartojn: Darek Płackiewicz, str. J.Bema 55 m. 6, 91-429 Łódź, Pollando.

23-jara studentino de Agrikultura Akademio interesigas pri Esperanto kaj kuirarto, volas ekoni revojn kaj problemojn de gejunuloj: Barbara Mizera, ul. Nowoursynowska 161, 02-766 Varsovio, Poll.

34-jara kosmetikistino, fraŭlino, kolektas bildkartojn, ŝatas filmon, muzikon, librojn: Grażyna Gasa, ul. Spokojna 5, 43-229 Pszczyna-Ćwiklice, Pollando.

17-jara lernantino de mezlernejo interesigas pri fotografado, kolektas bildkartojn kun hundoj: Ewa Niznik, str. Opolska 19/85, 31-276 Kraków, Pollando.

18-jara lernantino de liceo interesigas pri muziko kaj turismo, kolektas kasedojn. Adreso: Ewa Wołczyk, ul. 26 Marca 27/31 44-300 Wodzisław Śląski, Pollando.

14-jara lernantino interesigas pri turismo, literaturo kaj sporto, kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn, fotojn, malgrandajn kalendarojn: Klaudia Buniak, Zwiastowice 44, 48-258 Twardawa, Opole, Pollando.

19-jara nova esperantisto havas hobion muziko, li tre ŝatas auskulti danemuzikon, interesigas pri turismo kaj literaturo: Mariusz Korszeniewski, PL-09-213 Gosdowo, str. Dworcowa 9, woj. płockie, Pollando.

50-jara ekonomo, si laboras en teknikumo: Władysław Niwelina, str. B.Bieruta 12/2, 33-300 Nowy Sącz, Pollando.

24-jara studentino interesigas pri turismo kaj muziko, ŝatas pentri kaj fotografi, kolektas bildkartojn: Alicja Sieracka, str. Skośna 14/9, PL-43-300 Bielako-Biała, Pollando.

30-jara instruistino, edzino, volas korespondi: Anastazja Wysocka, 05-800 Pruszków, ul. Kosciuszki 42 m 9, Poll.

20-jara polino volas korespondi kun la tuta mondo: Bosena Sudek, 39-300 Mięleco, ul. Kusocińskiego 19/78, woj. Rzeszów, Pollando.

Nova esperantisto interesigas pri turismo, literaturo, filmo kaj muziko, kolektas sondiskojn kaj bildkartojn. Adreso: Robert Ćwik, str. Ścieżeczka 35/130, 27-400 Ostrowiec, Pollando.

33-jara kuracistino interesigas pri libroj, turismo kaj la homo - ĝia vivo, kulturo. Adreso: Ewa Jaszczak, str. Dębnystrów 7/19 m 2, PL-42-200 Częstochowa, Pollando.

20-jara polo interesigas pri sporto, muziko (country), danco: Mirosław Zawadzki 80-398 Gdańsk-Oliwa, str. Obronców Wybrzeża 4e/85, Pollando.

Volas korespondi Teresa Szczytkowska, ul. 22-Lipa 19/34, 62-510 Konin, Poll.

20-jara knabino interesigas pri turismo, literaturo, muziko kaj modo: Ewa Broda, Wał-Ruda 67, 33-133 Wał-Ruda, Pollando.

15-jara lernantino interesigas pri libroj, turismo, lingvoj angla, E-o, medicino, kolektas poŝtmarkojn: Agata Daniel, 15-911 Białystok, str. Ogradowa 2m66, Poll.

# ESPERANTO en servo de la ALIKONSTRUO

La vorto perestrojka - alikonstruo, eniris jam en plurajn lingvojn kaj farigis nocio. Sed tamen, mi ne estas certa, ĉu ankaŭ Esperanto transprenu ĝin, ĉar ni havas tute taŭgan kaj konvenan esprimon "alikonstruo" aŭ por la procedo "alikonstruado".

Ĉi tiu procedo estas la gvida diskut-temo en la socialismaj landoj, sekve estas tute nature, ke ankaŭ la esperantistoj studas la eblojn, kiamaniere ni povus helpi al la alikonstruado kaj per tio ankaŭ al Esperanto. Oni nepre devas pruvi, ke Esperanto estas utila, eĉ necesa por la alikonstruado, kaj nur poste oni povas atendi iun subtenon kaj agnoskon. El tio, kio jam estis dirite aŭ skribite pri la alikonstruo, ni vidas, ke ĝi tuŝas precipe tri sferojn: la materie-produktadan, la socian, kaj la internacian. Komprenible, la tuta amplekso de la alikonstruo estos objekto de pli profundaj kaj pli detalaj studoj ankaŭ flanke de la esperantistoj. En ĉi tiu artikolo mi volus tuŝi nur 3 aŭ 4 punktojn, kiuj estas jam nun evidentaj.

En la materie-produktada sfero la plej profunda ŝanĝo estas la ŝanĝo de prioritatoj. Ne plu la materia kvanto estos decida, sed racieco en uzado de la fontoj. Tio postulas aktivigi intelektualajn kaj spiritajn fortojn de la socio. Ni povas ege helpi al ties realigo per plifaciligado de interŝanĝado de informoj pri novaĵoj, pri novaj labormetodoj, ktp. simple dirite - ni devas helpi la informadikon. Nia esenca kontribuo al la informadiko povas esti per nia plej grava laboro - per la terminologio. Tio signifas ellaboradi kaj kompletigadi la sencese kreskantajn terminarojn, kaj subtenadi la laborojn de Terminologia Esperanto-Centro. Tio estu nia unua-ranga tasko - punkto numero unu por informado de la neesperantista publiko.

En la socia sfero, la alikonstruo nove pritaksas la rolon de la individuo. En la ekonomia kaj socia progreso kreskas la rolo de persona disvolvigo, edukiteco kaj klereco. Ĉiu homo devus havi plenan eblecon realigi sin mem en la plej vasta senco, ĉar nur la spirita nivelo de homoj destinas kaj reprezentas la nivelon de la vivo. Tio presumas tutvivan studadon, kaj tia studado denove antaŭkondiĉas konstantan kaj facilan alireblon al ĉiuj fontoj de scioj kaj konoj: kaj en libroj kaj aliaj publikaĵoj, kaj per komputilaj retoj, kaj ankaŭ per personaj kontaktoj kun alilingvanoj. Tio evidente presumas, ke ĉio estos atingebla per nur unu lingvo. Ĉi tie okulfrapas identeco de la postuloj de la alikonstruo kun la dua prioritato de la Nova strategio de UEA - faka aplikado de Esperanto. Tio povas esti la punkto numero 2 por nia informado.

En ĉiu lando estas aliaj kondiĉoj, aliaj okazoj, prezentigas. En nia lando, kaj versajne en la socialismaj landoj generale, tre grava faktoro estas la sindikata movado. Unu el la taskoj de la sindikatoj estas ankaŭ klerigado de la laborhomoj. Jen mia persona sperto: en nia malgranda urbo mi proponadas jam ekde 1982 establi klerigan kaj Informan Centron: ĝi servu al ĉiuj: al studentoj, al profesie aktivaj homoj, kaj ankaŭ al pensiuloj, kiuj volas ankoraŭ esti aktivaj en iu formo. /Tio ĉio sen mencio pri Esperanto./

La ideo estis generale akceptata, konsiderata grava, nur financaj rimedoj mankis. Sed por ni grava rezulto de tiuj streboj estis, ke la sindikata klubo ebligis al ni okazigi terminologian kurson en la jaro 1986. Kiel konate, ĉi tiu kurso grave kontribuis al kreo de la Terminologia Esperanto-Centro en 1987 dum la Universala kongreso en Varsovio. Nun, post kiam la lokaj instancoj ekkonis la signifon de la kurso, kaj de Esperanto, oni serĉas pli intense vojojn al iu centro ekipita per modernaj helpiloj. Esperanto kiel ilo kaj peranto por klerigado de homoj povas esti objekto de punkto numero 3 por nia informado laŭ la prioritato unu de UEA.

Neesperantistoj kaj kontraŭuloj de Esperanto povus diri, ke ĉio tio povus esti efektivigata per iu ajn granda, vaste konata kaj uzata lingvo, kaj ke ni ne bezonas enkonduki novan lingvon. Respondon al tio donas la tria prioritato de la Nova strategio de UEA, nome la postulo pri edukado al monda konscio. Praveco de tiu postulo konfirmas ankaŭ la eventoj en Irlando, Jugoslavio, Kaukazaĵ kaj Ĉebaltaĵ respublikoj, en Izraelio, k.s.

Ankaŭ la laukonstitucia egalrajteco, sed fakta malegalrajteco de lingvoj en la Europa komuno povas esti germo de malharmonio inter la membroj. Ĉion tion konsiderante ni povas konkludi, ke kie ajn iu potenca lingvo iusence dominas super iu alia malpli forta, ĉiam ekestas malakordo kaj rivaleco, eĉ malamikeco, mise evoluas la patrioteco, troigas naciismaj emocioj.

La alikonstruo ankaŭ en la internaciaj rilatoj celas establi egalecon, amikecon, harmonion.

Nur supernacia lingvo povas solvi tiun situacion kaj garantii egalrajtecon de ĉiuj.

La internaj kondiĉoj en Hindujo estis certe la kaŭzo por la eldiro de Miĥajl Gorbaĉov en novembro 1988, ke "ni ĉiuj devas konsciiĝi, ke la mondo estas integra kaj internacia". Tio povas esti kvazaŭ slogano por nia agado.

Tiu starpunkto plene-identas kun la tria prioritato: edukado al tutmonda konscio.

La tempo montros, ke ekzistas pliaj punktoj, kiuj estas egalaj aŭ similaj por la alikonstruo kaj Nova strategio de UEA. Ni zorgeme observu la evoluon kaj strebu sencese montri al la mondo, ke ambaŭ - la alikonstruo kaj Esperanto - celas al kunlaboro, harmonio, kaj paco en la mondo.

Mi bone scias, ke tio, kion mi ĵus prezentis ĉi tie, ne estas io nova, sed mi volis emfazi, kiumaniere ni celigu la unuan prioritaton de la Nova strategio, nome informadon de la neesperantista publiko kaj de politikaj instancoj.

Jiří Laube

## EDMOND PRIVAT - 100 jaroj

Prof. Edmond Privat estis unu el la plej firmaj kolonoj de la internacia Esperanto-movado kaj estas vere simbolo, ke post la solenaĵoj de la Centjarigo de Esperanto en 1987 ni solenas ĉi-jare la centjaran jubileon de tiu ĉi multflanka kaj alttalentita apostolo de Esperanto.

Lia multflankeco estas vere impona: li estis elstara verkisto, aŭtoro de poemaro (Tra l' silento) kaj versa dramo (Ginevra), ĵurnalista kaj redaktoro (Juna Esperantisto, revuo Esperanto 1920-1934),

li estis elstara historiisto (Vivo de Zamenhof, Historio de Esperanto), gramatikisto (Esprimo de sentoj en Esperanto), aŭtoro de lernolibroj (por francoj, Kurso lernolibro, Karlo) kaj oratoro,

li estis elstara funkciulo (prezidanto de UEA kaj de Svisa Societo Esperanta), organizinto de fakaj Esperanto-konferencoj kaj propagandisto (Esperanto antaŭ la Ligo de Nacioj),

li estis elstara sociaganto, li subtenis la aferon de la subpremitaj nacioj, prezidis diversajn komitatojn kaj konferencojn celantajn sendependigon de la subpremitaj popoloj, li verkis librojn "Interpopola Konduto" kaj "Vivo de Gandhi".

Edmond Privat estis universitata profesoro en Genevo kaj Lausanne, li naskigis la 17-an de aŭgusto 1889 kaj mortis la 28-an de aŭgusto 1962.

# STANISLAV SCHULHOF

1919

1989

Forpasis jam sepdek jaroj ekde la morto de la Esperanto-poeto D-ro Stanislav Schulhof, la fondinto de la originala Esperanta poezio.

Li estis reprezentanto de la ĉeĥa juda movado en Pardubice, ĉeĥa poeto kaj verkisto, kiu kontribuis al multaj ĉeĥaj gazetoj kaj verkis porokasajn poemojn kaj teatraĵojn (eks. Věno - Doto, ludita de amatoroj en la jaro 1903). Sed lia ĉefa signifo estas en lia Esperantlingva literaturo aktiveco.

Li naskiĝis la 12-an de novembro 1864 en Lipka apud Trhová Kamenice, en grand nombra familio de juda komercisto. Por plibonigi la ekonomian staton de la familio, la gepatroj decidigis elmigri en Usonon kun la infanoj, escape de du plej agaj filoj Leopold kaj Stanislav, kiuj restis en Bohemio. La pli aĝa frato Leopold ebligis al Stanislav studi medicinon. Tiu post la studoj kaj post dujara praktikado en Dobruška, Červený Kostelec kaj Vratislav finis specialajn studojn kaj fariĝis kurasisto-dentisto.

Kiel dentkuracisto li ekloĝis en Pardubice kaj havis tie daŭran praktikadon. Tie li edziĝis kaj kun sia edzino Hermína li havis tri infanojn - filon, filinon kaj adoptitan filinon. Li estis tre klera homo, homamanto kaj bonfaranto kaj patrioto. Li posedis la germanan, francan, anglan, ĉinan, latinan kaj Esperanton.

Li vigle partoprenis en la loka esperantista vivo en Pardubice, en la lastaj jaroj de sia vivo li estis prezidanto de la loka Esperanto-klubo. Li publikigis multajn propagandajn artikolojn ĉeĥlingvaj kaj ankaŭ multajn artikolojn en Esperantaj revuoj, li verkis teatraĵojn (ekz. dum kunveno de orientbohemiaj esperantistoj en Hradec Králové la 21-an de majo 1911 estis ludita lia "První lekce" (Unua leciono) - ĉeĥa-esperanta serĉo, fare de membroj de la laborista E-klubo en Pardubice), kaj precipe li verkis poemojn, originalajn kaj tradukitajn.

Li mortis nur 55-jara je meningito en Patologia instituto en Prago la 18-an de aŭgusto 1919 kaj eterne li ripozas en Pardubice. Unu el la stratoj de Pardubice portas lian nomon.

En la jaro 1911 aperis liaj poemoj "Per espero al despero" kaj "Kion la vivo alportis" kaj en 1912 "Aŭtunaj floroj". Li estis unu el la malmultaj verkistoj de la unua periodo de la Esperanta literaturo, kiaj konsiderinde kontribuis al la altigo de la estetika nivelo de la Esperanta literaturo. El liaj poemoj la plej konataj estas "Sovaga kanto", tradukita en kelkajn lingvojn, "Kanto de Sklavo", kiun W. Auld nomas "belega korokrio" kaj "En la mondon venis nova sento", poemo de kum-

trema elano, kiu muzikigita de Heikki Klemetti estis kantata de la finna ĥoro "Suomen Laulu" dum la 14-a UK en Helsinko (1922).

La tradukita poemaro "Bohemaj grenatoj" estas antologieto de ĉefaj poetoj, pri kiu D-ro Kamaryt skribis, ke la poezia lingvaĵo de tiuj tradukoj superas tiun de la originalaĵoj.

V. Benczik skribis pri li: "Schulhof estis vera poeto, ne simpla versfaranto. Li dankas sian atentindegon ne nur al la fakto, ke li verkis apenaŭ dudek jarojn post la naskiĝo de la lingvo."

Kaj K. Kalocsay: "Mi freŝe memoras pri la granda emocio, kiam mi unue legis ĉi tiujn poemojn, en kiuj ... prezentis sin homo, kiu simple kaj sincere rakontas al ni siajn sentojn, kaj kies sentoj estas indaj por rakonti ilin. - Tri volumetoj, en ili tridek poemoj. Konstanta evoluo kaj pliperfektigo - rompita de la morto."

Ĉi-jare pasas jam 70 jaroj ekde la morto de Stanislav Schulhof kaj 125 jaroj post lia naskiĝo. Tio estas konvenaj momentoj por reveni al lia verkaro. red-



D-ro Schulhof (responde al kritiko fare de la aŭtoro de internacia slava lingvo "Slovanština" en revuo Osvěta lidu):

Estas sendisputa fakto, ke Esperanto estis kreita de geniulo, estas kompreneble, ke la sama kreis ankaŭ la vortaron Esperantan, sed la aŭtoro de "Slovanština" eĉ ne rimarkis, ke la fundamenta parto de la vortaro de Zamenhof estas sole negrava parto, kompare al la hodiaŭa riĉa vortaro Esperanta, kies vortojn nek faris nek elpensis unu homo, eĉ ne unu institucio por tio elekta, sed miloj da izolitaj kapoj, do verŝence la vivo, kiel okazas ĉe ĉiuj lingvoj naturaj, vivaj kaj mortaj. Estas sendispute, ke Esperanto grandparte estas verko de genia Zamenhof, sed konsideri Esperanton kiel verkon de unu homo hodiaŭ absolute ne estas ebla, ĉar super ĝia organismo laboras de 25 jaroj tiom da kapoj kaj manoj, ke estas ŝo nepenseble, ke tiu ĉi kullaboro restu senrezulta. En tio bazas sin la supereco de Esperanto, ke Zamenhof ne donis al la mondo pretan kaj definitivan laboraĵon, sed ke li sole montris kaj difinis la vojon, kiam liaj adeptoj ne devas forlasi, de kiu ili ne devas dekliniĝi, por ke ili ne erariru plene. Cetere tiuj faktoj oni plej bone vidas sur la vortaro Esperanta mem. La hipotezo, ke Esperanto estas lingvo elfunde elpensita kaj arta, estas do nepre falsa. Esperanto estas sole rezultajo de ĉiam pli intensiva internacia vivo eŭropa kaj nemortanta merito de Zamenhof estas kaj estos ĉiam, ke bone li elscendis la animon de tiu ĉi vivo kaj difinis al ĝi la ĝustan vojon, sed Esperanto tia, kia ĝi estas nun, ne estas plu verko de Zamenhof, sed verko de la vivo. Esperanto ne estas plu meĥanismo, sed viva organismo.

# ALVOKO



La 1-an de junio 1914 oni inaŭguris en Františkovy Lázně, okaze de la 4-a Tut-aŭstria Esperanto-Kongreso, la unuan en la mondo grandan monumenton omage al L. L. Zamenhof. Iniciatis ĝin la bavara fervojisto kaj loka Esperanto-klubestro Jacob Hechtl, kiu per monkollekto havigis la necesan sumon. La monumento setis kvarpilastra bloko el artefarita stono, portanta supre bronзан reliefon de L. L. Zamenhof kun surskribo: Dro Zamenhof aŭtoro de Esperanto - Per Esperanto al Paco, Harmonio, Laboro kaj Dio!

En 1938 nazioj komplete detruis la monumenton. Ĉeĥa Esperanto-Asocio opinias sia morala devo renovigi tiun ĉi historiaĵon. Por povi plenumi tion, ĈEA kunlabore kun UEA anoncas internacian monkollekton. Donacinto de almenaŭ 40 gld. aŭ 200 Kčs ricevos dankdiplomon, kiu donacos 400 gld. aŭ minimume 2000 Kčs ricevos medalon kun gravurita dankesprimio, kaj kiu donacos 5000 gld. aŭ 25000 Kčs, ties nomo estos gravurita sur la monumento. Kiu donacos la plej grandan sumon, ricevos miniaturan suldaĵon de la monumento. Kontribuon bonvolu sendi al ĈEA, banka konto 3330-021, var. simbolo 789.15.

La inaŭguro de la malnov-nova monumento oni planas por la jaro 1992, por kiu ĈEA jam proponis Pragon kiel kongresurbon por la 77-a UK. Dum tiu jaro oni festos la 400-an naskigdatrevenon de la ĉeĥa elstarulo - ofte nomata "Instruisto de la Nacioj" Jan Amos Komenský-Komunio, kiun la esperantistoj prave konsideras prapatro de la internacia lingvo.

Laŭ proponakiso de la akademia skulptisto Jiří Hrubá la dimensioj de la nova monumento estos iom reduktitaj kompare kun la origina kaj ĝi estos muldita el bronzo kaj fiksita en poluritan artefaritan stonon, alta ĉ. 2,20 m.

P. Chrdle



# DONACIŇTOJ POR LA MONUMENTO

1. Karel Franc, Pardubice	2 000,-	
2. MUDr. Josef Hradil, Mnichovo Hradiště	500,-	
3. Vlad. Rychlík, Žacléř	200,-	
4. Ing. Vlastimil Kočvara, Opava	2 000,-	
5. Jana Němečková, Horní Planá	20,-	
6. Romana Bilderová, Volary	300,-	
7. Jaroslav David, Pustějov	50,-	
8. Magda Klementová, Praha	50,-	
9. Václav Špúr, Doksy	300,-	
10. Joachim Gissner, Herzberg, FRG	2 100,-	7520
11. PhDr. Jaroslava Hájková, CSc., Praha	500,-	
12. Milada Vaněčková, Praha	100,-	
13. A. Stránská, Praha	20,-	
14. Věra Herzogová, Žamberk	200,-	
15. Antonín Mlčák, Štítý	200,-	
16. Oldřich Toman, Děšín	200,-	
17. PhDr. Jitka Podžorská, Dlouhá Ves : u Sušice	30,-	
18. Františka Blažková, Hradec Králové	400,-	
19. Jiří Šnapka, Vyškov	300,-	
20. Bohumír Horák, Brno	200,-	2150
21. Jan Jaško, Luhačovice	100,-	
22. František Zmeškal, Huštěnovice	200,-	
23. Gustav Gajdsica, Třinec	300,-	
24. František Mančík, Slavkov	200,-	
25. Helena Divílková, Hrabyně	200,-	
26. Roman Heřman, Mladá Boleslav	200,-	
27. Ludmila Švanygová, Rohatec	200,-	
28. Karel Kamas, Orlová	250,-	
29. Anna Hrazdírová, Mariánské Lázně	500,-	
30. Josef Hofman, Plzeň	200,-	2350
31. Vladimír Mašita, Zvoněšov	200,-	
32. Hana Vašková, Blevice	100,-	
33. Josef Novosad, Ostrov	500,-	
34. Anna Vozáková, Slavišín	100,-	
35. Ing. Zdeněk Pluhař, Holovousy	200,-	
36. Lída Komzáková, Tábor	300,-	
37. Leopold Žeravík, Chvojeneo	100,-	
38. Květa Bartošová, Svitavy	50,-	
39. Leonard Pavlík, Topolčany	300,-	
40. Ing. Yvonna Pícková, Podveky	2 500,-	
41. Ludvík Chytil, Přerov	200,-	
42. Marta Barničová, Vsetín	30,-	

(Dařigota)

16 600,-

# Lingvaj temoj

## ĜUSTIGO DE LINGVAJ ERAROJ EN SOCIOLOGIA RAPORTO

Bernard Golden

Unu el la plej interesaj publikigaĵoj eldonitaj lastatempe en Ĉeĥoslovakio estas Sociologia Esploro de Sintenoj al Esperanto /Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Prago, 1981/. Ĝi pritraktas la rezultojn de sociologia esploro de parto de la esperantistaro en Ĉeĥoslovakio. Tie ĉi mi ne intencas prikomenti la fakan enhavon de tiu verko, kiu meritas esti trastudita kaj komparita kun aliaj similaj enketoj. Erara estas la aserto sur pĝ. 3, ke ĈEA organizis "ĝis nun la plej ampleksan similan esploron". Bedaurinde, nek la iniciatoroj de la esploro nek la sociologo Marie Durnová sciis pri multe pli profunda esploro de la membraro de la Esperanto-Asocio de Britujo, kiun faris Peter G. Forster, sociologo de la Universitato de Hull, Anglio, en 1968 /1/.

Mia celo estas atentigi legantojn pri la lingva nivelo de la raporto, kiu ne estas sufiĉe alta por ĉi-speca scienca verko. Mi ne priskribos ĉiujn erarojn, kiujn mi trovis, sed nur donos ekzemplojn de la plej karakterizaj specoj, kiuj ripetigas en la teksto.

### 1. Manko de akordo de adjektivo kun substantivo

"Ĉiu demandaro enhavis 13 fundamentajn demandojn, koincidantaj laŭenhave kaj stile ..." /pĝ. 6/  
"Koincidantaj" devas esti en la akuzativa kazo same kiel la substantivo "demandojn", al kiu ĝi rilatas.

### 2. Uzo de adjektivo anstataŭ adverbo

"Interesa nur estas, ke pensiuloj emfaze vidas avantaĝon de Esperanto en ebligo de la societa rilato ..." /pĝ. 22/  
Kiam la subjekto estas propozicio /en tiu ĉi ekzemplo "ke pensiuloj emfaze vidas ..."/, la predikativo havas adverban formon; "Interese".

### 3. Transitiveco de verboj

"... aferojn ... kiuj ankoraŭ antaŭ kelkaj jardekoj evoluigis tute propracele." /pĝ. 3/  
"Evolui" estas netransitiva verbo, do la sufikso "-iĝ" estas superflua.

### 4. Semantikaj eraroj

"Esperanto ne domaĝus, se mi scius ĝin." /pĝ. 31/  
Plurfoje en la raporto la verbo "domaĝi" estas uzata anstataŭ "damaĝi", kiu estas ĝusta, ĉar oni volas diri, ke Esperanto ne malutilus aŭ kaŭzus perdon, se oni scius ĝin.

5. Konfuzo inter subjunkcio kaj adverbo

"... esperantistoj kun pli supera klereco tendencas prestigon de Esperanto malaltigi, dume esperantistoj kun la baza klereco kaj kun profesia atesto atribuas al ĝi pli superan prestigon." /pg. 24/

"Dume" estas adverbo signifanta "intertempe, dum tiu tempo", do ĝi tute ne taŭgas en la citita frazo. En ĝi estas esprimitaj du sintenoj, unu kontraŭa al la alia. Pro tio, estas necese uzi la subjunkcion "dum", kiu signifas "kontraste kun tio, ke".

6. Trouzo de vorto kun malpreciza signifo

"La respondintoj mezaĝaj respondas plivere per la varianto n-ro 1." /pg. 42/

"Plivere" estas uzata tre ofte en la teksto de la raporto, sed eĉ en kunteksto ĝia signifo ne estas klara. Ĉu ĝi eble estas mistraduko de vorto en la ĉefa originalo?

7. Neglositaj neologismoj

"La ĉefa celo de la analizo estis, verifi kaŭzojn ..." /pg. 5/  
"Verifi" ne estas registrita en Plena Ilustrita Vortaro /PIV/, la plej kompleta Esperanta vortaro nuntempe havebla /2/, do la tradukinto estis devinta ĝlosi ĝin. Fakte, ĝi vere ne estas neologismo, aŭ por esprimi tion alimaniere, ĝi estas malnova neologismo, kiu ne sukcesis enradikigi en la lingvo. Boirac registris ĝin en sia Plena Vortaro eldonita en 1909-1910. Ĝi havas plurajn sinonimojn en Esperanto: kontroli, konstati la verecon de, inspekti, ekzameni, revizii, konfirmi, pravigi, verigi, certigi, pruvi /per eksperimento/, dokumenti. Eble pro tio esperantistoj opiniis ĝin balasta aldonajo al la lingvo, kaj leksikografoj ignoris ĝin.

8. Nekutima vortuzo

"Ĉi tiu demando havas signifon por la adjudikanto ..." /pg. 12/  
Laŭ PIV "adjudikanto" estas komerca termino, signifanta ŝtatan administranton, kiu proponas laboron, liveron ks. al konkurencoj, ordinare kun la antaŭkondiĉo, ke la akiranto estos tiu, kies prezoj estos la plej favoraj. Tute ne estas klara la funkcio de adjudikanto kadre de la sociologia esploro.

Sur la laŭta paĝo de la raporto troviĝas informoj pri ĝia redaktado, desegnado kaj tradukado, sed mankas la nomo de la lingva revizianto. Verŝajne pro ties malesto, ne estis eble elsarki ĉiujn erarojn antaŭ publikigo.

Notoj

1. Vidu la duan parton /Esperanto in Britain, pg. 263-374/ de anglalingva verko de Peter G. Forster: The Esperanto Movement, Mouton Publishers, The Hague, Paris, New York, 1982, 413 pg.
2. La verbo "verifi" mankas ankaŭ en la Suplemento de PIV eldonita en 1987.

Multaj eminentaj verkoj de naciaj literaturoj atendas sian esperantigon kaj siajn tradukantojn, kiuj estas ankoraŭ tre raraj. Kiel komenci?

Unue elektu grandan verkon /50-paĝan/ kaj traduku ĝin kvazaŭ gazetan artikolon; ne gravas, se la traduko havos ankoraŭ mankojn el la artisma vidpunkto, ĉar vi nur ~~okzercigas~~ kolektas spertojn. Unue vi bezonas alproprigi al vi tradukan rutinon, sur kiu vi povas bazi viajn artismajn strebojn. Kiam la traduko estos finita, ripozu iomete kaj traduku la verkon ankoraŭfoje. Poste komparu ambau tradukojn kun la originalo kaj ellaboru trian, jam definitivan version de la traduko.

Kiam vi farigos majstro de tradukado, vi ne bezonos prepari tri tradukojn, vi nur korektos kaj plibonigos la unuan version, sed kiel tradukistaj lernanto kaj komencanto dorlotu la verkon kiel bebon, traesploru ĝin detale. Tia trifoja tradukado de la sama verko estos por vi pli utila ol unufoja traduko de tri verkoj, ĉe kiuj vi kontentigus per malalta lingva nivelo.

Estas rekomendinde uzi tuj tajpilon kaj traduki ĉiun frazon kiel tuton, ne vorton post vorto. Kutimiĝu al tia tutfrazo tradukado, kiu liveros al vi fraŝan stilon kaj gustan Esperantan vortordon.

Antaŭ la unuaj provoj pri tradukado komparu iun bonan tradukon de iu ajn verko kun la originalo aŭ komparu du nacilingvajn tradukojn de unu verko faritajn de du diversaj tradukistoj. Vi eble miros, ke en la tradukoj ofte troviĝas grandaj ŝanĝoj de vortordo, estas uzitaj diferencaj frazkonstruoj, kelkajn ne gravajn vortojn oni eĉ eljetis ktp. Por atingi similan stilan belon kiel en la originalo necesas apliki tiajn artifikaĵojn, sed nur ĝis certa grado.

Trejnante tradukadon ne forgesu samtempe pliperfektigi viajn lingvajn kaj literaturajn sciojn. Studu librojn pri literaturo, pri traduk-arto, pri poetiko, pri literatura kritiko ks., ĉar vi bezonas bone kompreni la tradukotan verkon kaj la artismajn intencojn de la aŭtoro. Pligrandigu vian vortrezoron kaj lernu ankaŭ proverbojn kaj frazeologiajn esprimojn. Havigu al vi grandan eksplikantan nacilingvan vortaron - vi konvinkiĝos, ke vi ne konas kun certe ĉiujn vortojn de via gepatra lingvo!

Bonajn ideojn notu en kajeron, kolektu sinonimojn, ĉar la beletra stilo postulas abundan kaj redundan esprimadon, kiu tamen ne bezonas esti neologisma. Ni ankoraŭ ne scias uzi ĉiujn eblojn de la estanta vortprovizo! Ne forgesu, ke preskaŭ ĉiun vorton eblas verbigi kaj uzi ĝin figure kaj metafore.

Sukceson en la laboro!

## SEMINARIO PRI TRADUKADO

En novembro 1990 ni rememoros la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de Rudolf H r o m a d a (1890-1964), majstra ĉeĥa tradukanto en Esperanton kaj eminenta vortaristo. Honore al lia memoro aranĝos Ĉeĥa Esperanto-Asocio internacian seminarion pri beletra tradukado. Spertulojn ni petas sendi prelegojn, eĉ se ili mem ne povos partopreni la seminarion persone. La prelegojn ni intencas eldoni libroforme ankoraŭ antaŭ la seminario kaj aranĝi ilin proksimume laŭ jena skemo:

- 1/ Rudolf Hromada kaj lia verkaro
- 2/ Signifo de tradukado por la Esperanto-movado
- 3/ Edukado de tradukemuloj
- 4/ Lingvistiko, stilistiko, poetiko, kritiko
- 5/ Teorio de tradukado
- 6/ Analizo de tradukota verko
- 7/ Stilaj proprecoj de Esperanto
- 8/ Tradukado de slangoj, dialektoj, metaforoj, paroliturnoj k.s.
- 9/ Uzado de vortaroj kaj enciklopedioj
- 10/ Analizo de famaj tradukoj (Biblio, La Faraono, Cezaro ktp.)
- 11/ Eldonebloj, aŭtoraj rajtoj, manuskriptoj, korektoj

La prelegojn kaj anticipajn aliĝojn sendu al la adreso: Miroslav Malovec, Charkovská 7/10, 625 00 Brno, Ĉeĥoslovakio.

La lokon kaj daton de la seminario ni ankoraŭ anoncos.

-MM-

## De la redakcio

En la unuaj du ĉi-jaraj numeroj de Starto troviĝas preseraroj, kiujn bonvolu korekti. En la 1-a numero temas pri jenaj:

(paĝo/alineo/linio) 5/3/2: okazis la 4-an ĝis la 11-an de... - ĝuste devas esti: okazis de la 4-a ĝis la 11-a de...

7/1/3: proviĝ bani - ĝuste devas esti: provis bani sin

14/2/8: decigos - ĝuste devas esti: decidigos

25/10/4: oficiate - devas esti: oficiale

25/10/4-5: pro-Pra - devas esti: pro-pra (malbona funkcio de la cilindro de tajpilo)

26/1/7: havis K,- Kĉs - ĝuste devas esti: havis 5,- Kĉs

En la numero 2/89:

7/1/3: tagoj 15-an ĝis 17-an - devas esti: tagoj 15-a ĝis 17-a

8/3/5: Fryderyk - devas esti: Fryderyk

13/1/1: hindraŭdinamiko - ĝuste devas esti: hidraŭdinamiko

18/2/2: ĝi - devas esti: ĝi

23/2/5: evoligon - devas esti: evoluigon

23/4/2: neevitebla - ĝuste devas esti: neeviteble

26/1/11: kompletigas - devas esti: kompletigas

27/1/15: forta - devas esti: forte

28/2/4: nur ili povas plenumi literaturajn agojn - ĝuste devas esti: nur ili povas plenumi liturgiajn agojn

Ni dankas al s-ano Ing. W. Hebdá pro la atentigo pri la eraroj. Samtempe ni petas pardonon de niaj legantoj.

# ni legis

Demando: "Li elektigis fare de la aŭstria popolo." Mi neniam antaŭe vidis tian pasivon en Esperanto. Sed ŝajne tiu novtipa pasivo eklogas en nia lingvo, ĉar mi trovis ĉi tiun saman: "Kaj dek tri elcentoj de la Kapitalo de Teknowledge acetigis far General Motors!" Kion vi povas diri pri tia strukturo? (J. Soaniewski).

Respondo: Jam la uzo de "far" anstataŭ "fare de" estas malrekomendinda laŭ la Oficiala Informo de la Akademio (nova serio n<sup>o</sup> 5 de julio 1986). Sed multe pli grava solecismo, se ne Fundamenta barbarismo, estas la uzo de formoj en "igi" anstataŭ la pasivaj formoj. Tion faras ĉiuj, kiuj volas eviti la fundamentan elekton inter "ita" kaj "ata" participoj: ili detruas vole nevole la unuecon de la Lingvo. La ĝustaj formoj estas: "Li estis elektita de la Aŭstria popolo", "kaj dek tri elcentoj de la Kapitalo de Teknowledge estis acetitaj de General Motors!". La uzo de "igi" formoj anstataŭ pasivo estas tolerebla nur se oni ne konas aŭ ne volas indiki la aganton, kvazaŭ ĉio efektiviĝus per si mem. Obstini en tia eraro estas minimume rekta subfosado de la lingvaj nuancoj!

Demando: Kiam la citaĵo estas neesperanta vorto aŭ esprimo, ekzemple: "John Smith legis "Les Misérables" en la franca lingvo", la manko de akuzativo ne ĝenas min; sed mi kvazaŭ ribelas, se mi aŭdas: "Ili trastudis la "Fundamenta Krestomatio". (Carlos I. de Jesus).

Respondo: Efektive tia estas la uzado: "La citaĵo gramatike estas ĉiam nevaria" (PAG § 132). Kaj se kompreneble tio ĉi apriorie povas ŝoki, eble pro tio d-ro L. L. Zamenhof ĉiam uzis en tiaj okazoj anoncvorton kun akuzativo: "Neniam uzu la vorton "amo"<sup>2</sup>, "tiam uzu la pronomon "oni"<sup>2</sup>ktp. Tial viaj dubaj frazoj klarigas per unu subkomprenita vorto akuzativa:

- a) - Mi legas (la gazeton) "Heroldo de Esperanto" de antaŭ multaj jaroj.
- b) - Li ofte konsultas la (libron) "Plena Ilustrita Vortaro".
- c) - Zamenhof tradukis la (verkon) "Hamleto".
- c) - Mi ofte legas (la libron) "Sankta Biblio", sed la (parton) "Malnova Testamento" nur de tempo al tempo.
- d) - Zamenhof subskribis la (tekston) "Deklaracio pri Esperantismo" en 1905.
- e) - Zamenhof publikigis la (brosuron) "Unua Libro" en 1887.
- f) - En nia Esperanto-klubo ni kantas (la himnon) "La Espero" antaŭ la komencigo de ĉiu kunveno.
- g) - John Smith legis (la verkon) "Les Misérables" en la franca lingvo.
- g) - Ili trastudas la (libron) "Fundamenta Krestomatio".

(Jen ni prezentis al vi du demandojn kaj respondojn el nova revuo "La leteroj de l' Akademio de Esperanto". En la 5-a numero, kiun ni ricevis, en la rubriko "Oficialaj Informoj de La Akademio de Esperanto" estas eksplikitaj du landnomoj: diference de la ĝisnuna uzo ili estas KOREO kaj EGIPTO, la loĝantoj estas koreanoj kaj egiptanoj.)

En La Brita Esperantisto -januaro-februaro 1989- en artikolo "Kial ne estas unueco" la aŭtorino "Olga" klarigas la neunuecan uzadon de la landnomo Ukrainio/Ukrajnio/Ukraino/Ukrajno. La problemoj pri ĵ/i kaŭzas la ukraina lingvo, kiu donas eblecojn transskribi la vorton Ukraina diversmaniere, pro vokalo ĵ, propra al la ukraina alfabeto. En Esperanto al la ukraina ĵ respondas: ĵi. Tiu kunmetaĵo ne estas ofta. Tamen, diversmanieraj esperantistoj facile distingas inter JIDA kaj IDA. Do la plej proksima al la originala prononco estus vorto: Ukrajnio. Tamen okazis tiel, ke dum la fruaj jaroj de Esperanto diversaj esperantistoj-pioniroj prenis el ĵi nur unu elementon kaj tiel estigis haĉso: jen Ukrain-, jen Ukrajn-. La solvon de la problemoj komplikigis ankau tiu fakto ke ĝis 1917 la carisma registaro oficiale malpermesis uzon de la vortoj ukraino kaj Ukrajnio. Ĉiuj aŭtoroj devis uzi la vortojn: malgrandruso, Malgranda Rusio (aŭ Malgrandrusio - kontraste al Grandrusio - t.e. Rusio mem). La malpermeso kaj timo de cenzuristoj estis tiom forta ke ĝi videblas ankau en "La Fundamenta Krestomatio" - en ĝi temas nur pri "malgrandruso". Tial la problemoj pri la landnomo reaperis nur post la revolucio en 1917.

La "Rusa-Esperanta" kaj "Esperanta-Rusa" vortaroj de Bokarev (temas pri rusaj vortaroj, car ukrainaj daŭre atendas eldoniston...) registras la formojn: ukraino(naciano) - Ukrainio(lando). Kaj en la lando mem neniu plu diskutas pri la temo. Krom eble kelkaj tradukistoj/poetoj, kiuj sopiras formon "Ukrajno" kiel pli poezian. Eble, ĝi estu la poezia formo? Kaj fine: ni lasu nacianojn mem decidi kio ili estas. Ĉu mankas aliaj taskoj por la Akademio?

En "Esperanto-servo de la Aŭstria Esperanto-Instituto" (N-ro 4/88) oni diskutis pri jenaj lingvaj demandoj:

- Ĉu "personeco" por publike konata persono?

"Personeco" signifas ne personon mem, sed nur "econ" de iu persono. "Personulo" ja estas tautologio. AEI pro tio rekomendas do uzi la vorton "eminentulo" por Persönlichkeit (ceho osobnost).

- Ĉu oni diras konatulo aŭ konato?

AEI: "konato" estas private konata persono, "konatulo" estas persono de publika konateco.

- Ĉu en dato uzi "lundon" aŭ "lunde"?

AEI: por certa tago oni uzas -n, ekzemple: lundon la duan de majo 1988, "lunde" kutime oni uzas por esprimi ke io okazas ĈIUN lundon aŭ do kutime en lundo. Lundon kaj lunde do ne estas nuraj sinonimoj, kiel la nuna lingvouzo faras tion. Lingvo rica havas la eblecon diferencigi, tial "lundon" estas la preferinda formo, se temas pri u n u lundo.

Goldenaĵo korektenda.

En Staro (1989, 2, 14) B. Golden riprocas al C. Mallia (1984) pro lia termino "oalkolito" kaj proponas la formon "kalkolitiko". Bedaŭrinde, ambau formoj estas malgustaj. Ja neniel temas pri referenco al kalko aŭ al kredo (angle: chalk, prononcata kun ĉ), sed pri referenco al la helena Falkos (= kupro).

J. Kavka

# ESPERANTO-AKTIVECOJ

La Semajno de Internacia Amikeco okazis en Poděbrady dum la tuta semajno de la 19-a ĝis la 25-a de februaro 1969 en la Kulturcentro de la stacidomo sub la titolo

## "ESPERANTO ĈE NIAJ NAJBARAJ".

Ĉiu vespero estis dediĉita al unu najbara lando. Al la partoprenantoj oni montris multajn E-ajn materialojn kaj informis ilin pri la E-movado en la koncerna lando. Oni povis vidi du originalajn leterojn de D-ro Zamenhof al pragraj esperantistoj skribitaĵ en la jaro 1908. Krome oni projekciis kolorajn diapozitivojn el la ĉefurboj de la preparolitaĵ landoj. Ĉiuvespere partoprenis meznombre 14 esperantistoj.

Al esperantistoj kaj landaj asocioj de la koncernaj landoj oni sendis salutmesaĝojn.

La lastan tagon oni dediĉis al la movado en Ĉeĥoslovakio. Precipe oni aprezis la fakton, ke okaze de la 400-a naskiĝjaro de J. A. Komenský ĈEA invitis arangi Universalan Kongrecon en Prago.

Pri la tuta aranĝo informis la loka semajnjurnalo Nymbursko per longa artikolo, kiun preparis A. Dubinová, kaj ankaŭ la loka radio en Poděbrady. La Esperanta flago kaj surskribo "Amikeco trans limoj" atentigis la publikon pri la aranĝo dum la tuta semajno. La tutan aranĝon preparis la konata esperantisto, sakisto kaj voĵaganto s-ano Ladislav Fiala el Poděbrady.

## SUKCESA RENKONTIĜO EN BUĈOVICE

Korespondaj kursoj de Esperanto estas en Ĉeĥoslovakio sufiĉe disvastigita formo de lernado, kiu alĉiras ĉiam pli da adeptoj. La dudeko da instruistoj de ĈEA instruas ĉirkaŭ 450 lernantojn. Sed ne ĉiam la lernantoj trovas vojon en la vicojn de aktivaj esperantistoj. Jam en pasintaj jaroj okazis kelkaj renkontiĝoj de lernantoj de korespondaj kursoj. Ĉi foje, dank' al organiza talento de d-ro Vladimír Škoda, kuniris kvardek lernantoj el Moravio. Inter la 24-a kaj 26-a de februaro gastigis ilin motelo Arkáda kaj klubejoj de apuda uzina klubo. Ili ekkonis Esperanton ne nur en la skriba, sed ankaŭ en la parola formo. La programo estis racia kaj labora. Dum dek instrueroj oni lernis en tri kursoj sub gvidado de siaj instruistoj. La kurson por komencantoj gvidis d-rino Marie Vančurová, progresintojn instruis Miroslav Malovec kaj konversacion d-ro Vladimír Škoda. En ĉiuj kursoj oni pridiskutis la plej grandajn problemojn gramatikajn kaj stilistikajn, oni ekzercis la gramatikajn partojn, kie oni kutime plej multe eraras dum la skriba kurso. La kontakto kun la instruisto kaj interkompreno en la kolektivo certe multe helpas al serioza intereso pri la lingvolernado. Krome, la ĉeestantoj estis informitaj pri la movadaj aferoj. La prezidantino de la pedagogia sekcio klarigis al ili la celojn kaj agadon de ĈEA kaj de pedagogia sekcio mem, s-ro Křimský havigis al la lernantoj la ĉiam bezonatajn vortarojn, dum la diapozitiva vespero oni konatiĝis kun la etoso de ŬEA kongresoj, kun la tendara vivo en Lančov kaj rezultoj de la lasta ĈEA kongreso en Olo-



mouc. Miroslav Malovec parolis mallonge pri la historio kaj literaturo de esperantista movado. Tiu ĉi arango montrigis valora, ĉar la ĉeestantoj vigle interesigis pri la prezentitaj aferoj kaj ni povas reale atendi, ke ili aktivos ankau en estonteco.

V. Barandovská

#### ESPERANTISTOJ-INVALIDOJ LABORAS

La unua ĉi-jara seminario de esperantistoj-invalidoj efektiviĝis en Plzen la 18-an kaj 19-an de marto 1989. Ĝin partoprenis 23 sekcianoj kaj unu malgranda hundo. Ĉiuj havis eblon atesti siajn konojn el perletera E-kurso. Plimulto el la partoprenintoj unuafoze aŭdis paroli Esperante. Malfacilajn partojn de E-gramatiko klarigis s-ro Vaněček, anuzaĵn dialogojn kaj magnetofonbendigojn preparis s-ino Malínská.

Agrablan medion certigis geedzoj Kašpar en klubo de invalida junularo. La seminarion ankau vizitis konata e-istino s-ino Turková, kiu al ni transdonis buston de d-ro Zamenhof.

Al ĉiuj partoprenintoj la seminario plaĉis kaj rezulto? - Ĉiuj interkonsentis regule unufoje monate renkontiĝi kaj plibonigi siajn E-sci-ojn sub gvidado de profesoro Mráz.

J. Malínská

#### CENTRO ZAMENHOF

La bjalistokanoj bezonas konstrui en la mezo de la urbo sur kvar hektaroj kulturan centron kun novaj kongresejo, teatro, kinejo, hotelo, restoracio, biblioteko ks. Kosciante, ke Zamenhof estas la plej mond-fama naskiĝinto en la urbo, ili proponas uzi la kapacitojn de la estontaj objektoj parte ankau por la esperantistaj celoj kaj atendas, ke nia movado helpas disfami la urbon kaj ĝiajn belaĵojn kaj atrakciojn kaj venigi turistojn el la tuta mondo. Parto de la universitata biblioteko estos destinita al la interlingvistika literaturo, en la universitato oni klopodos enkonduki ankau esperantologion kiel studobjekton. En la urbo jam nun okazas Esperanto-kursoj, en pluraj lernejoj, ie eĉ devige. Antau du jaroj estis inaugurita nova busto de Zamenhof. La strato, sur kiu staris lia naskiĝdomo, nomigas Zamenhof-strato kaj sur la nove konstruita domo troviĝas memortabulo. Onidire ankau unu el hospitaloj havas la nomon de Zamenhof. Por plivigli la Esperanto-movadon la estraro de la urbo intencas donaci al esperantistoj la palaceton Lubomirski, barokan domon starantan en parko. Tie povos okazi kursoj.

Okdek kilometrojn de Bjalistoko, apud la fama praarbaro kun uroj, lupoj, aproj kaj kastoroj, en Bialoveĵa, okazis en la tagoj 17.-18.3.89 seminario (gvidata de Humphrey Tonkin), kies tasko estis starigi la partoprenon de la esperantistoj en la konstruado de la Centro Zamenhof, kiel bjalistokanoj intencas nomi komune la novajn objektojn. Krom trideko da esperantistoj partoprenis la seminarion ankau la bjalistokaj vojevodo kaj universitata rektoro, kiuj proponis al la Esperanto-movado eluzon de la konstruota kultura centro, kiu kompreneble estos uzata precipe de la urbanoj por iliaj bezonoj.


La seminario konstatis, ke en la urbo eblos fondi bibliotekon de interlingvistiko kiel parton de la universitata biblioteko, Zamenhof-muzeon pri lia verko kaj tempo, efektiviĝi diversajn Esperanto-festivalojn

KIEL KLEVOJ VIZITIS  
1999


Verĝis kaj!  
desegnoj  
Pavel Prokopych

Klevo n-ro det nau  
desegnoj pri kinejon  
en kinejon

Ĝi iris kaj renkontis  
klevon n-ron 18  
"Kien vi iris, klevo det.  
nau?" demandas  
la detoto.




3



2

Ĝi do iris plu, kaj  
renkontas klevon  
n-ron det sok.



16



5

Ĝi do iris plu, kaj  
renkontas klevon  
n-ron det sok.



6

kun kulturaĵ kaj turismaj programoj kaj ĉefe organizi kursojn pri la lingvo, pri instruado, ĉiĉeronado, pri esperantologio, pri belarta kaj faka tradukado kaj ankaŭ pri la pola lingvo, historio, kulturo, pri la ĉirkaŭanta naturo, pri la vojevodiaj etnoj kaj religioj /katolika, ortodoksa, juda kaj muslima/ k.s. La Esperanto-movado kapablos eluzi nur parton de la kapacito de la centro, tamen por ke esperantistoj sentu sin tie hejmece kiel en "sia" centro, la urbo atendas, ke la E-movado kontribue ankaŭ per simbola monsumo de almenaŭ unu miliono da dolaroj. Por tiu celo okazos kolektaj inter la esperantistaro.

La partoprenantoj de la seminario kunvenis la 16-an de marto en Varsovio, poste ili forveturis al Bialoveĵa al la hotelo Iwa tuj apud naturmuzeo. La unuan vesperon okazis vespermango en arbaro kun bivakfajro kaj kornomuziko, la sekvan vesperon estis projekciitaj filmoj pri Bjalistoko /en Esperanto/ kaj pri la Bialoveĵa praarbaro /en la pola/. Dimanche matene la partoprenantoj vizitis la praarbaron kaj zooparkon kun nur lokaj bestoj - uroj, cervoj, alkoj kaj sovaĝaj ĉevaloj tarpanoj. Poste ĉiuj forveturis al Bjalistoko, kie estis por ili preparita malgranda trarigardo de la urbo kaj prezentado de la teatraĵo Eta Princo en Esperanto. Lunde ĉiuj forveturis en Varsovion kaj hejmen. Inter la partoprenintoj de la seminario estis ankaŭ nepo de Majstro, d-ro Zamenhof-Zaleski, loĝanta en Francio.

Inter ĉ. 30 personoj el Pollando, Usono, ĈSSR, Hungario, GDR kaj FRG, Francio, Belgio kaj Litovio estis H. Tonkin, D. Blanke, A. Pettyn, O. Princ, I. Koutny, d-ro Frank, ankaŭ unu japano loĝanta en Pollando; el ĈSSR ceestis M. Zvara, V. Němec kaj M. Malovec. M.M.

## SCIENC-TEKNIKA SEKCIO

Laŭ Raporto pri la agado de la Scienca-teknika sekcio de ĈEA en la jaro 1988, verkita de Ing. Zdeněk Pluhař kaj Jiří Laube, Doc. RNDr. Vlastimil Novobilský, CSc., pro gravaj familiaj kialoj devis en novembro retirigi provizore el sia funkcio kaj tial lin anstataŭas Ing. Pluhař en la funkcio de prezidanto.

La sekcio havas 130 membrojn, kiuj plejparte laboras en la fakaj grupoj de la sekcio:

- agrokultura - ĝi revivigas sian agadon en la ligo kun la aktiveco de TEC, pri tio meritas precipe Jiří Laube,
- akustika - ĝi baldaŭ prezentos la duan laboran version de "Terminaro de akustiko" por faka oponado, la grupon gvidas Miroslav Baroš,
- aviada - partoprenas precipe pere de sia gvidanto Ing. Jan Pospíšil en la terminologiaj laboroj (aeronautiko) en TEC,
- biologia - la funkciulo de la sekcio Karel Kraft klopodas trovi kompetentajn fakulojn por la finredaktado kaj eventuala aperigo de la botanikaj terminaroj de la mortinta prof. Mlynář,
- geodezia - daŭrigis laborojn preparajn por la faka ĉefa kaj Esperanta terminaro, helpe de hungara seslingva geodezia vortaro; gvidanto

estas Václav Stibůrek,

- komputista - partoprenis precipe en la internacia kunlaboro super komputikaj terminoj; gvidanto estas Ing. Josef Vojáček,

- terminologia kaj normiga - ĝi estas parto de la Sekcio de Normigo de TEC. La membroj de ĉi tiu faka grupo partoprenis en la diskutado kaj aprobo de jenaj TEC-normoj: TEC FRE 003 350 Numerado de TEC-dokumentoj

TEC FRE 651 713 Letor-signoj en TEC

Regularo por Sekcio de Normigo.

Plue oni partoprenis en la diskutado super la terminaroj de TEC pri aeronautiko, fizikaj grandoj kaj unitoj, stomatologio kaj termodinamiko.

Daŭras kontaktoj kun sciencaj-teknikaj formaĵoj en la najbaraj landoj kaj en Kubo kaj Ĉinio, nome Ĉina Akademio de Sciencoj en Pekino.

La laborplano de STS ĈEA por la jaro 1989 enhavas i.a. jenajn erojn:

- subtenadi la aktivecon de la fakaj grupoj en STS kaj helpadi al fondado de novaj grupoj,

- subtenadi la intensan kunlaboron kun TEC, minimume sur la ĝisnuna nivelo,

- instigi kaj registri fakan publikan aktivecon de la membraro de STS ĈEA,

- daŭrigi kaj evoluigi la kunlaboron kun sciencaj kaj teknikaj institucioj en eksterlando,

- daŭre pliriĉigadi la fakan libraron de STS kaj instigadi pli viglan elpruntadon,

- finprepari por la eldono la informan publikajon pri fakaj aplikoj de Esperanto en nia lando,

- plu aktive partopreni en la preparoj de la ĝenerala vortaro Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta, por la Ŝtata Pedagogia Eldonejo.

## NOVAĴOJ EL SOVETUNIO

Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), unu el la plej imponaj landaj organizaĵoj en la historio de Esperanto, malaperinta en 1938 sub la stalina teroro, vivas denove en Sovetunio. "Perestrojko" (rekonstruado) atingis ankau la Esperanto-movadon.

En konferenco okazinta en Moskvo de la 23-a ĝis la 25-a de januaro 1989, esperantistaj delegitoj el la tuta lando decidis forlasi la ekzistantan Asocion de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) kaj reiri al sia historia praorganizaĵo. En petakribo al la Konsilio de Ministroj, ili alvokas por rekonno de la jura statuso de SEU, atentigante ke tiu organizaĵo neniam estis oficiala malpermesita. Kaj sen atendi, ili jam elektis novan estraron kaj komencis agadi ekster la burokrataj kadroj, kiuj ĝis nun katenis ilin.

Fondita en marto 1979, ASE se sia 10-jara historio neniam sukcesis ekroli kiel pozitiva forto en la sovetia E-movado. Male, ĝi rapide transformigis en efikan bremsilon de la agado, precipe kiel barilo de ĉiaj internaciaj kontaktoj (kun

escepto de tiuj kun la socialismaj landoj).

Vladimir Samodaj, redaktoro de la araba eldono de Moskvaj novaĵoj, farigis prezidanto de SEU; apud li en la estraro gidas ses vicprezidantoj: Anatolij Gončarov, Viktor Aroĵviĉ, Sergej Kuznecov, Anatolij Kozakov (ĉiuj el Moskvo), Boris Kolker (Ufa) kaj Aleksandr Melnikov (Rostov-ĉe-Don). Preskaŭ ĉiuj novaj funkcianoj de SEU estis aktivuloj de la iama neoficiala sed brila Sovetia Esperantista Junulara Movado, kiu agadis de 1965 ĝis 1978.

Jam antaŭ tiu mejloŝtona konferenco inter septembro kaj decembro 1988, la iamaj filioj de ASE en Estonio, Latvio kaj Litovio eksigis el ASE kaj refondis siajn nemstarajn E-organizaĵojn. La delegitoj el la tri baltaj respublikoj ĉestis la konferencon en Moskvo kiel gastoj kaj deklaris ke ili konsideros aligon al SEU "se tio montrigos sencohava". Espereble ĝi ja montrigos tia.

(Fragmente el "Esperanto" 2/1989)

## Novajoj el Uralo

Esperanto penetris en Uralon jam en 1887 kaj kelkaj uralaj adresoj troviĝas en la Unua Adresaro kompilita de L. Zamenhof. Precipe aktiva kaj bunta estis la esperantista vivo en la intermilita periodo, kiam funkciis Urala Filio de SEU. Sed la sangaza stalina glavo komplete nenigis la movadon en la Stona Zono, kaj dum du jardekoj regis Granda Silento. Nur la hruščova varmigo kaj la moskva junular-festivalo premisis ege penigan renaskiĝon. Tamen la ĉenero elfalis - neniu aktiva urala SEU-ano postvivis la katastrofan Purigon...

La aktivado atingis sian maturiĝon nur en la 1980-aj jaroj, i.a. danke al la koresponda instruado de la neĵacigebila Boris Kolker kaj pro la kuraga agado de la plene neoficiala Urala Esperanto-Komitato. Flanke de la burokratia bremsado de ASE estis akiritaj certaj sukcesoj. Nun en Uralo funkcias dudeko da Esperanto-kluboĵoj, regule okazas planlingvistikaj konferencoj ĉe la Perma Universitato, estas eldonataj informilo "Ekzakte" kaj kultura almanako "Sesonoj". La literatura vivo viglas: Nikolaj Lozgaĉev, Gafur Gazizi, Viktor Sapojnikov, Halina Gorecka kaj aliaj uralanoj ofte valore kontribuas al "Literatura Foiro" kaj "Hungara Vivo". La Kolektiva Esperanta Biblioteko (KEB), fondita antaŭ 6 jaroj, nun kalkulas pli ol 800 volumojn (impona kvanto por la netranspagipova lando!).

La 18-an de decembro 1988 en Sverdlovsk okazis evento grava por ĉiu urala adepto de la Zamenhofs idioma: estis fondita la Urala Esperantista Societo. UES daŭrigos kaj evoluigos la pozitivajn aktivadojn, iniciatitajn en la lastaj jaroj (kleriga, kritika, eldona, kulturpolitika, histori-esplora, planlingvistika) kaj stimulos kelkajn novajn direktojn. Cetere, UES planas realigi ekspansian agadon fondante E-kluboĵojn en ĉiu granda urala urbo, eldoni ruslingvan informilon "Fakto", pli intime labori kun la t.n. "neformalaj" organizaĵoj kaj movadoj, i.a. kun Verduloj. La agadon organizas okkapa komitato, inkluzive la prezidanton, Viktor Klockov. (Aleksander Korĵenkov en Heroldo de E.)

## Mallonge el USSR

KOPSO estas Esperanta instruĵo kooperativo en Moskvo. Ĝin formas nau sufiĉe spertaj esperantistoj kaj prezidanto, kiu ne estas esperantisto, sed emeritiginta juristo, sen kies sperto estus nefacile sukcese agi. Oni instruas Esperanton al moskvanoj kaj koresponde al loĝantoj de la tuta lando. Nun oni havas kelkcent korespondajn lernantojn...

Interservo estas datumbazo pri korespondemuloj. Por ke la lernantoj povu tuj apliki la ellernitan lingvon, oni faris perkomputilan bankon de adresoj. Adreso de Interservo: a-ino Larisa Birkukova, Uralakaja ul. 5, SU-107241 Moskvo, Sovetunio.

FEJA - Fondaĵo de esperantistaj junularaj arangoj - estas libervola socia organizaĵo konsistanta el la plej aktivaj sovetiaj esperantistoj. Ĝia statuso kiel jura personeco kaj ĝia rajto ekzisti kaj kiel kultur-kleriga kaj kiel komerca entrepreno havigas al la Fondaĵo multajn eblecojn.

SEJM - Sovetia Esperantista Junulara Movado ekzistis en la jaroj 1952-79. La fonda konferenco de SEJM 2 okazis la 25-31ajn de decembro 1988 en la Junulara Esperanto-Centro apud Tastagol (Siberio). La konferenco akceptis la projekton de la Statuto, laŭ kiu SEJM estas memstara socia organizo. Membroj de SEJM estas esperantistoj ĝis 35 jaroj.

UNIKO - Unuigo por Novtipa Internacia Kulturo - unuigas kaj koordinas la laboron de landaj kulturcentroj kaj apartaj E-intelektuloj, kiuj konscias pri la neceso de kvalita progreso de esperantismo kaj ĝia kulturo. UNIKO aldonas periodaĵon "Survoje".

Esperanto-Asocio de Estonio estis refondita la 22-an de oktobro 1988 kadre de la IV neregula konferenco de Estonia Filio de ASE. Prezidanto de EAE estas Ferdinand Eisen, sekretario Jean Ojalo.

Litova Esperanto-Asocio (kiu funkciis dum 1919-1940) estis refondita la 10-an de decembro 1988, kadre de la Zamenhof-Tagoj. Prezidanto estas prof. L. A. Skupas, sekretario Povilas Jegorovas.

Latvia Esperanto-Asocio estis fondita la 11-an de decembro 1988 (pli frue ĝi ne ekzistis). Prezidanto Maris Jakobsons. (Laŭ TEJO-Tutmonde)

# ● ● klubba vivo

**HAVÍŘOV** La 9-an de feb. rakontis s-ano Vlado Sládeček pri sia liber-tempo dum Turistaj tagoj en Žilina, kie partoprenis multaj eksterlandaj gastoj. Li ankaŭ audigis per magnetofono E-ajn kantojn kaj en sian rakontadon metis spritajn aludojn. - Je la 2-a de marto ni festis la Internacian Virinan Tagon kun konvena regaletoj per dolcaĵoj kaj trinkaĵoj. La prezidanto Zd. Heiser bonvenigis kaj bondeziris al samideanĉoj, da kiuj ĉeestis pli multe ol da viroj. Prof. Mil. Pastrňák recitis versojn pri panjo de Jaroslav Seifert, tradukitajn fare de Jiří Kořínek. S-ano Holan rakontis pri sia restado en Budapeŝto kun detaloj pri tieaj interesaj konstruaĵoj. Dum ambaŭ vesperoj estis projekciataj belaj diapositivaj. A.St.

**LIBEREC** De la 15-a de novembro ĝis la 9-a de decembro la E-Klubo ĉe la Parko de kulturo kaj ripozo Liberec aranĝis ekspozicion de la Esperanta gazetararo en Koloseo en Liberec-Pavlovice kunlaboro kun la Parko de kulturo kaj ripozo kaj Klubo de esperantistoj en Železný Brod. La klubanoj aperigas tre konatan bultenon Libereca Informilo, ĉi-jarg en bela nova kovrilo. Okaze de la 70-a datreveno de la fondigo de la ĉeĥa esperantista klubo en Liberec oni aperigis jubileajn insignojn.

**ZNOJMO** EK en Znojmo aranĝis la 31-an de marto VESPERON de ESPERANTO omage al la 20-a datreveno de ĈEA en salonego de KULTURDOMO. La kultura programo konsistis el deklamado, kantoj en E kaj prelego pri signifo de ĈEA. Poste s-ano Jaromír Polák parolis pri longa vojo al Japanujo, de kie visitis lin leteramiko. Estis prezentitaj koloraj lumbildoj pri Japanujo. Partoprenis multe da esperantistoj kaj ankaŭ gastoj. Ĉiuj estis vere kontentaj.

La EK ankaŭ aranĝis en la urba biblioteko por infanoj ekspozicion de bildkartoj el la tuta mondo kaj afiŝoj pri Esperanto. Rv.

**OSTRAVA-VÍTKOVICE** Interesan sciencaĵan hobion havas ano de la klubo Antonín Bombionka, kiu en sia verko "Dendrologia manlibro" kolektis indikojn pri ĉiuj koniferoj (pinglofoliaj arboj), kiuj kreskas sur eŭropa kontinento. Tiu ĉi kolekto enhavas 5 mil unuopulojn el 200 botanikaj specoj. Pri sia laboro pralegis s-ano Bombionka en klubo kunveno la 5an de aprilo sub titolo: Koniferoj - indikiloj de vivmedia pureco. Li menciis ankaŭ praantikvan keltan legendon lau kiu se pereos la lasta konifero, pereos ankaŭ la homaro. La nuntempaj spertoj montras al ni scion preskaŭ similan. Nova teorio venas el okcidento sub nomo "elektromagnetisma smogo". Temas pri malfavora influo de nedirektitaj elektromagnetismaj ondoj je arboj proksima de grandaj fontoj de elektra energio. Tiun ĉi malkovron oni ankoraŭ studas. Prelego, kiu volis vekti intereson pri ekologiaj problemoj, plene sukcesis. Janouš



En la lernojaro 1988/89 sukcese finis la vesperan kurson en Prago  
de kursestrino Ludmila Křesinová jenaj gekursanoj:

Zuzana Bernardová, Dolní Břežany 226, Praha-západ, PSČ 252 41  
 Jiřina Dvořáková, Družební 602, Kutná Hora - 284 01  
 Dr. Eva Lišáková, nář. B. Engelse 36, Praha 2 - 128 00  
 Zdena Minaříková, Pod Marjánkou 1b, Praha 6 - 169 00  
 Petr Frajer, Viktorinova 6, Praha 4 - 140 00  
 Milena Rubášová, Berkova 1699, Praha 4 - 149 00



En la lernojaro 1988/89 sukcese finis la vesperan kurson en Prago  
de kursestro Ing. Ludvík Veselý jenaj gekursanoj:

Ing. Karel Blažek, Bajkonurská 736/2, Praha 4 - PSČ 149 00  
 Hana Čejková, Žalovská 435, Praha 8 - 181 00  
 Věra Dušáková, Machuldova 596, Praha 4 - 140 18  
 Hana Hrabá, Šumavská 16, Praha 2 - 120 00  
 Lidmila Koudelková, Famfulikova 1137, Praha 8 - 182 00  
 Miloš Soběslav, nam. Jiřího z Poděbrad 9, Praha 3 - 130 00  
 Iva Špryňarová, Lečkova 1521, Praha 4 - 149 00  
 Ing. Milena Trnková, Opletalova 8, Praha 1 - 110 00



Festo de Internacia Tago de Virinoj en Vitkovice, kie bone festis ankaŭ  
virsaj membroj de E-klubo



Sovetiaj gastoj dum la vizito ĉe klubanoj de E-klubo Ostrava



---

---

# Efektive okazis

LA PERDITA SAMIDEANINO

Mia kolegino, inteligenta fraŭlino, scipovas bonege germanan, rusan kaj francan lingvojn. Ŝi intencis eklerni ankaŭ lingvon anglan. Aŭdinte pri tio mi konvinkis ŝin, lerni anstataŭ angla lingvo Esperanton, kiu estas tre facila kaj per kiu oni povas gajni amikojn en la tuta mondo.

Mia kolegino aliĝis do al E-kurso kaj post ĝia trapaso intencis komenci internacian korespondadon. Ŝi trovis en Starto konvencion anoncon kaj forsendis leteron proponantan interŝanĝi leterojn pri libervolaj temoj. /La nomon kaj patrolandon de la anoncanto mi ne povas memkompreneble sciigi./

Du monatoj forpasis sen respondo. Mi certigis mian koleginon ke la anoncanto ricevis verŝajne tro multe da proponoj kaj ne povas tuj al ĉiuj respondi. Ŝi atendu ankoraŭ kelkajn semajnojn kaj se neniam respondo alvenos, ŝi skribu je alia anonco.

Du tagojn poste venis mia kolegino kaj rakontis al mi nekredblan historion: "Hieraŭ vespere je la oka horo sonorigis iu ĉe mia pordo. Mi konjektis ke alvenas mia najbarino por pruntepreni iun bagatelon, kio ofte okazas. Mi malfermis la pordon kaj estis terure surprizita. Antaŭ la pordo staris nekonata viro, terure dika, nerazita kaj kovrita de ŝvito. Apud li staris virino, ankoraŭ pli dika ol li kaj ankoraŭ pli ŝvitanta.

La viro komencis paroli. Mi komprenis nenion, sed ekkonis ke li parolas esperante. Tiumomente mi forgesis ĉion, kion mi ellernis en la E-kurso. Mi balbutis ion germane, france kaj la viro miksis ankaŭ ĉiujn eblajn lingvojn por komprenigi kun mi. Fine mi ekkonis ke li estas anoncanto kiu ankoraŭ ne respondis je mia letero kaj ke li kun sia edzino deziras esti gastigitaj kaj loĝigitaj ĉe mi. Mi estis ege ŝokita ĉar mi havas tute malgrandan unuĉambran loĝejon de kvara kategorio. En malgranda ĉambro troviĝas sole unu lito, en kuirejeto sole lavokuvo kaj en koridoro necesejo komuna kun najbaroj. Krom tio mi havis nenian provizon da nutraĵoj.

Mi montris al ili, mian loĝejon kaj proponis ke mi mem, malgraŭ ke estas jam vespero, serĉos por ili konvenan malmultekostan hotelon kie ili povus bani sin kaj bone ripozi. Je mia grandega surprizo ili rifuzis mian proponon, ĉar ili ne havas sufiĉe da mono por hotelo kaj ke ili nepre restos ĉe mi. Ili estas pretaj dormi sur la planko kaj lavokuvo al ili tute sufiĉas.

Mi estis tiel ekscitita, ke mi povis eĉ ne paroli. Kion fari. Fine ili restis ĉe mi. Mi preparis por ili ambaŭ, du dikuloj, mian liton kaj mi mem kuŝiĝis sur la benko en kuirejo. Tutan nokton mi ne dormis.

Matene ili vekigis ĝustatempe. Mi preparis por ili teon kaj bulkojn, pli multe mi ne havis. Ili dankis min kaj foriris. Alveninte en mian okupon mi rakontis la tutan historion al miaj gekolegoj.

Ĉiuj multe ridis kaj mokis min. Vidu vian bonegan Esperanton, lingvon de amikeco kaj frateco. Ĉu vi estas ankoraŭ entuziasma pri ĝi?"

De tiu tempo mia kolegino volas eĉ ne aŭdi pri Esperanto.

Si fariĝis la perdita samideanino.

MAJA, Brno

---

## *nia recenzo*

Branko Ĉopić: LA LEGINDAJ PARTIZANOJ. Nekutima elmilita rakontaro. Esperantigis Branko Miljko. Studaĵo pri la aŭtoro fare de d-ro Muris Idrizović. Kun kelkaj tutpaĝaj ornamantoj. Eldonis Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, Sarajevo, 1987. 76 paĝoj, formato 14,5 x 20 cm, kartonita.

La aŭtoro de la studaĵo pri Branko Ĉopić diras, ke tiu estas la plej populara jugoslava verkisto kaj unu el la plej grandaj majstroj pri mallongaj rakontoj. Lirikaj elementoj en la rakontoj konsistigas potencon parton de la beleco de ĉi tiu prozo. La rakontoj de Ĉopić ekscitas spiriton kaj fantazion de la leganto, okupas per simpleco kaj arta sincereco.

En la libro oni legas pri heroaj faroj de la jugoslavaj partizanoj. La stilo de la aŭtoro estas malproksimega de ĉiu bombastaĵo, li rakontas tre sobre, kun kora tono pri kuragaĵaj faroj, kiajn la partizanoj plenumis. Kaj li paroligas ne nur homojn, sed ankaŭ printempon, montojn, arbarojn, riverojn, armilojn, agrikulturajn ilojn. Li rakontas populare, eĉ kun iom da humuro, sen tragikeco, kiu en vivo de la partizanoj ne mankis.

La stilo estas generale bona kaj legeblas flue. Serbkroataj nomoj estas Esperante transskribitaj /temas precipe pri supersignitaj literoj/. Estas uzataj kaj klarigataj nacilingvaj vortoj: ĉetniko, domobrano, opanko, ŝvabo (= popola nomo por germano/ ks. La tradukinto provas prezenti ankaŭ dialekton en formo facile komprenebla, ekz. c = ĉu, t aj = tiaj, ki l = kiel, ks. Preseraroj estas maloftaj.

Diskutebla estas la titolo de la libro. "Leginda" /tiu ĉi vorto mankas en PIV/ povas esti nur ia teksto, ne persono. Tial pli bone konvenus diri "La privilegindaj partizanoj" /t.e. partizanoj, pri kiuj indas legi/. Sed la senco de la titolo bone esprimas la nivelon de la libro.

Adolf Staňura

M i m o ř á d n á   n a b í d k a

V letošním roce vychází Učebnice esperanta pro samouky od Věry Barandovské (Kčs 35,-), kterou Vám nabízíme k dodání během posledního čtvrtletí letošního roku.

---

Závazná objednávka

Objednávám na dobírku ..... výtisků

Barandovská: Učebnice esperanta pro samouky (Kčs 35,-)

jméno: .....

---

adresa: ..... PSČ .....

Všechny závazné objednávky budou kladně vyřízeny!

Objednávku laskavě zašlete na adresu:

**infoservo**  
pošt.schránka 6  
143 00 PRAHA 4

# Karel Čapek

## pri lingvaj problemoj

Merite de la PRAGA LINGVISTIKA CIRKLO /PRAGA SKOLO/ kaj de ĝiaj debat-renkontigoj klaras: Inter ni ekzistas granda kaj vivanta intereso pri nia lingvo. Ne gravas, ke ni solve ne decidis la malnovan diskuton inter lingvo-puristoj /gramatikistoj/ kaj defendantoj de la lingvo v i v a n t a, f o r m e perfekta kaj sekve de tio transiranĝa limojn de la fikse n o r m i t a lingvo. Mi pensas: dum tiu ĉi polemiko ne ekzistas eblo interkonsenti, kiu pravas, sed oni povas minimume akordigi en kiu senco kaj fako ĝin uzi. La vivanta kaj literatura lingvo similas al naturo, en kiu ĉiu pajlero, ĉiu pasero en io diferencas de kiu ajn speco. Certagrade ĉiu unuopulo posedas propran idiomon: ĉiu familio havas sian jargonon, ĉiu grupo, ĉiu socia tavolo sian vortaron; kaj ĉefe ĉiu poeto kaj verkisto posedas sian propran lingvon.

La tuta vivo estas individueco; unusenseco, unueco, valideco, ĝenerala ordo estas verko de la abstrakta agado homa. Sed alimaniere la afero estas rilate al lingvo, kiu estas objekto por instruado. El mililoj da vivantaj idiomoj, kiujn ni nomas lingvo, oni povas instrui nur unu lingvon, kiu estas normita, konstanta kaj - konvencia. Tio estas lingvo l e r n e j a, certagrade artefarita, malriĉigita, abstrakta, kurte: lingvo g r a m a t i k a, se ni komparas ĝin kun lingvo vivanta kaj literatura. Eĉ ne tiu gramatika lingvo validas dum la epokoj; ĝi adaptigas al uzo de la nacio. Ĝi ne rajtas validi ĝenerale, por tio ĝi ne kompetentas, ĝi ne povas anstataŭi la lingvon vivantan /kaj literaturan/. Ĝi povas esti nur teoria fundamento, sed ne praktika normo de la lingvo vivanta /kaj literatura/.

Estus bone, se la verkistoj estus puristoj /gramatikaj/, sed mi ne dezirus, ke la puristoj farigos verkistoj-simple pro motivoj lingvaj. La kuiristo devas koni la certan porcion de la higieno, sed se la profesoroj de la higieno kuiras, la produkto certe ne estus manĝebla. Konflikto inter ni kaj la puristoj vanas: al puristoj apartenas la lernejo /kursoj/, al ni /verkistoj/ komuniki poezie kaj proze. Ignori la gramatikon nature oni ne povas.

La lingvo literatura estas pli vivanta, pli riĉa kaj pli esprimiva formo de la /sama/ lingvo. En danĝero situas la lingvo komunika /populara/ ĉiutaga, parolata de la homoj. La aktuala lingvo parolata /kaj nature gramatika/ estas pli plata, senfrukta kaj pli paupera, malriĉa. Ĝi ne konvenas adhere, ne estas konkreta, sed duonklara. Tion kaŭzas la presaro, populara literaturo, kunvenoj ktp. En la vivrapido mankas tempo por poluri la lingvon.

Karel Čapek en "O umění a kultuře" III. paĝo 327-329, Spisovatel, 1986. /Tradukis Jiří Karen./

## Komentoj de Jiří Karen:

Se Karel Čapek estas por ĉiuj diskutantoj aŭtoritato /kaj li vere tia estas/, oni devas scii:

- Praga lingvistika cirklo /PRAGA SKOLO/ naskiĝis en la jaro 1926. La konataj filologoj V. Mathesius, B. Havránek, B. Trnka, N.S. Trubeckoj, R.O. Jakobson, J. Mukařovský kaj aliaj sisteme esploris la lingvon ĉeĥan kohere kun aliaj lingvoj. La grupo eldonadis revuon "Slovo a slovesnost" /Vorto kaj literaturo/. La esplor-programo de PRAGA SKOLO postulis, ke ni studu la lingvon sinĥrone kaj diaĥrone. La studoj ebligis la novan starpunkton al literatura lingvo, kiun oni studis fone de la lingvo komunika, populara, ĉiutaga. Literatura lingvo enhavas en si ĈIUJN nivelojn de la lingvo: vulgaran, popularan, fakan kaj estetike poezian. La skolo prilaboris principojn de la nova POETIKO de la moderna poezio kompare kun la malnova Skolo parnasa, klasika, kies reprezentanto estis ekz. Jaroslav Vrchlický. Analizoj de la verkoj de K.H.Mácha, V.Nezval, Hora, Holan, Hałas, Seifert kaj aliaj montris entute novan vizagon de nia ĉeĥa poezio.

Se J.Rumler uzis la terminon de PRAGA SKOLO, li ne pensis, ke Urbanová, Rumler, Pič, Karen kaj aliaj kreas skolon, sed volis diri, ke ni membroj de la Literatura sekcio akceptas por nia literatura verkado principojn de tiu ĉi Praga lingvistika cirklo aŭ Praga skolo. J.Rumler trotaksis la klerecon kaj kulturecon de esperantistoj en nia lando, kiam li supozis, ke la afero estas konata. Oni vidas, ke la aferon oni ekkomprenis absolute false. Pri la eksterlando jam ne parolante, kiu bedaŭrinde malmulte scias pri la ĉeĥa scienco, arto kaj literaturo. Niaj Esperanto-revuoj inkluzive de FOIRO nenion scias pri tia skolo. Do, ni pardonpetas, ke ni uzis la terminon, kiu ne konatas, sed J.Rumler pensis, ke ĝi konatas. Pro tio la kritikoj, ke ni el Ĉeĥoslovakio ekstreme vidas nian signifon, proklamante nin por unu nova skolo en Esperantujo, vere falsas kaj estas miskomprenitaj. Grava sperto: se spertulo parolas al nespartuloj, li ne povas pensi, ke la afero konatas.

J.Rumler en senco de tiu ĉi skolo lingvistika ellaboris sian eseon pri variaj stiloj. Interese, ke neniu el kritikistoj parolis en siaj replikoj pri e s e n c e grava problemo de STILO kaj variaj stiloj de Esperanto. TIO estis senco de la broŝuro. Montri signifon de la stil-problemoj. Tiun problemon la legantoj ignoris, kaj ĝi PLEJE gravis. Malfelice J.Rumler volis konekse kun problemo de stiloj montri la neceson de la lingva riĉeco. Certe li malmulte parolis pri la metodo kiel riĉigi la lingvon elinterne, surbaze de propraj fontoj kaj resumante la novajn neologismojn kaj aldonante proprajn, li saĝne lanĉis ideon, ke li mem estas iu reformemulo de Esperanto. Se iuj el esperantistoj tuj anatemis lin, ili montris grandan miskomprenon. Do mi kredas, ke la diskuto nun kaptos alian direkton -pri STILOJ.

## Jiří Karen pri sia poemaro Flugilhava Ŝtono

La libro prezentas al legantoj resume la elektitajn versojn de Jiří Karen el liaj verkoj eldonitaj ekde la jaro 1972 ĝis 1984 libroforme /entute 8 libroj/. La libron redaktis William Auld, tradukis esperanten Jiří Kořínek, ilustris akademia pentristino Jiřina Adamcová, eldonis Fonto - Gersi Alfredo Bays en Brazilo. La aŭtoro verkis mem originale. Tiujn poemojn oni povas trovi sur paĝoj 79-80 kaj 147-170. La libro enhavas krom poemoj ankoraŭ interesan analizon de la verko de Jiří Karen. Tiun preparis literatura kritikisto Jiří Pavelka el universitato en Brno. Aŭtoro mem en la epilogo provis klarigi principojn de sia poezia kreado. Ankaŭ la biografiaj klarigoj povas esti interesaj por la leganto. Prezo: 6 dolaroj. 238 paĝoj. La libro estas presita sur vere luksa papero. La pentraĵoj belas 6 enlibre kaj du koloraj sur la kovrilo/.

La libron dividis la aŭtoro en ok partojn: I-a: RERIGARDO prezentas lirikan biografion de la aŭtoro kaj de lia generacio naskiĝinta ĉirkaŭ jaro 1920. II-a: POR MAJSTRO KAJ LIA MODELO enhavas facete brilantaĵon bildon de artistoj, kie verko profunde tuis la sentojn de la aŭtoro /Rembrandt, Mikelangelo, Beethoven, Chopin, Mánas kaj aliaj/. Helpe de tiuj personecoj la aŭtoro formulas sian home profundan mesaĝon al homoj kaj al homaro. III-a: MALLUMIGIS. La poemoj priskribas travivaĵojn de la aŭtoro en Tria regno kaj formulas la starpunkton de la aŭtoro al la problemo de la eterna militado interhoma. En la IV-parto: ETERNA AMATINO enhavas eble plej efikajn poemojn pri ama sento. Amo por Jiří Karen ne estas nur la erotika rilato. Male, li konceptas a m on kiel formon de la interhoma rilato, kiu sume prezentas por ni la kvieteton nomata: h e j m o. En la parto V-a: INVITO AL VOJAĜO, priantas la aŭtoro sian naskiĝregionon Vysočina kaj landon tiom kulture signifan - Armenion. La VI-a parto: ARBOJ MARSAS URBEN ni trovog ekologie orientitajn poemojn, kiuj defendas la naturon kontraŭ la egoismema homo, kiu por siaj milit-kaj profitinteresoj neniigas mem sian naturan ĉirkaŭaĵon. En la ĉapitro VII-a: FLUGILHAVA ŜTONO ni trovas etik-moralan mesaĝon de la aŭtoro kaj en la VIII-a ĉapitro: ANTAŬ OL BATOS LA NAŬA ONDO, lirike li formulas sian kaj ankaŭ nian vivon en situacioj de la ebla morto. La aŭtoro travivis tri dangeŝajn kor-atakojn, ne mankis multe kaj li perdis sian vivon. Li trovas en malfacilaj situacioj forton por vivi. Kio helpas al vivi? Tiel oni povus formuli la centran problemon de la libro. La poezio estas meditema sed ankaŭ home proksima al niaj ĝojoj kaj streboj.

### HEROLDO DE ESPERANTO KAJ LA LEGANTO PAROLAS PRI LA LIBRO

#### FLUGILHAVA ŜTONO de JIŘÍ KAREN

Mario Sola en Heroldo de Esperanto nro 12/1767/, paĝo 4, skribas:

Elektitaj poemoj esperantigitaj de Jiří Kořínek, kun originalaj poemoj de la aŭtoro. 240 paĝoj. Valora, sed tro enigma. Nepenetreblaj personaj spertoj aŭ nereĝoneblaj propraj meditoj. Valora verkaro, certe, sed ... Tro persona, iom enigma - tro enmemiginta estas foje lia verko, kiu fakte taugas por e l i t a j p o e z i s a t a n t o j; tial la komuna leganto povus trovi malfacila, eĉ peza, lian lirikon.

REJNA DE JONG, l e g a n t o de la verko skribas jene:

"Enhava estas la libro multvaria. Temas pri tre diversaj aspektoj, periodoj de la vivo socia kaj persona. Multaj poemoj aperte placas al mi, ekzemple la ciklo "Arboj marŝas urban" kaj pluraj pagoj de la ciklo "Mallumigis". Estas multe pli, mi mencias nur kelkajn. Tre utilaj estas la Epilogo, postparolo de la kaj pri la aŭtoro. Laŭenhave ĝi estas libro en kiun vi ĉiam denove povas enprofundiĝi. Jam plurfoje mi prenis ĝin en la manon, malfermis je iu hazarda paĝo kaj ĉiam mi restis legonta. Ankaŭ nun mi faris tion kaj la paĝo estis 158. Nu, ĝi tuj aldoniĝas al la poemoj preferataj de mi. Ankaŭ mi apartenas al tiu generacio kaj spertas mi la samon. Kaj ĵu pli ofte mi legas la poemojn, des pli ili kaptas min. La lingva kaj poezia niveloj bonas. Mi aparte atentis, ĉu estas diferenco inter la lingvouzo de la tradukinto kaj de la aŭtoro kreanta originale, sed mi trovis. Kaj tio ŝajnas al mi grava laudo precipe por la tradukinto JIRĪ KORĪNEK. Mi havas nur kelkajn negravajn kritiketojn, ekz. ne placas al mi la vorto "devastado" anstataŭ detruado kaj ruinigo. Ĝi ŝajnas al mi anglismo. Kial "aŭtostrado" anstataŭ aŭtoŝoseo? Laŭ mi ankaŭ ne eblas diri /paĝo 159/: Surmetu nian gardenon /en blankan dorstukon/. Laŭ mi eblas nur: Metu sur mian gardenon /blankan dorstukon/ aŭ: Surmetu sur mian gardenon /blankan dorstukon/. Sed tio estas ĉio.

La lingvouzo estas efektive bona. La poezia nivelo ankaŭ altas. Versoj kiel "Orelringetoj de l zorgoj", "Juvelo de malfacilaĵoj" kaj aliaj estas ravaj. Oni uzas multajn bildojn, ofte frapajn, ĉiam neatenditajn, originalajn, surprizajn, ekz. "hundego de tempesto" /paĝo 47/, "premo de surdeco" /p. 39/, "la hakilo de vengo" /p. 73/, "panbulojn de muntitaj domoj" /p. 160/ ktp. La versoj estas s i m p l a j p o r k o m p r e n i, tamen belsonaj, plaĉaj kaj per la uzo de majuskloj ili forigas la malavantaĝon de mankanta interpunkcio. La arango de la libro estas profesia kaj tre bela. La divido de la poemoj en la diversajn ciklojn estas placa kaj utila. Unu el tre bonaj eldonaĵoj, kiel plimulto de tiuj, kiujn eldonis FONTO de Gersi Alfredo Bays.

Propramane Rejna de Jong.

Rejna de Jong naskiĝis la 21-an de septembro 1922 en Hago, nederlando. Profesias kiel instruistino kaj dommastrino. Verkoj eldonitaj: EN SENVOJA SOVAĜEJO. Eldonis Kardo 1979. Poemaro tradukita el la nederlanda, aŭtoro Jacob Maris. DIVERSHUMORE. Poemaro originala, verkita en E-o. Eldonis Kardo 1980. Presita. LA MALGRANDA JOHANO. Romano de Frederik van Eeden. Tradukita el la nederlanda. Eldonis Fonto. BUKEDO DE ESPERANTISTOJ prezentas al ni - simile kiel K.Kalocsay iam la nederlandajn personecojn, kiuj aktivas en Esperantujo /inkluzive de la aŭtorino/. Tre valora kaj serioza poezi-libro sia estas FACETOJ. Aŭtoreldono 1984. La aŭtorino verkas en libera kaj ligita versmanieroj. Ni ekscias multon interesan pri la etoso ĉirkaŭanta la aŭtorinon. Ŝi prikantas nian aktualan mondon ofte en tono kritika. Ne nur romantikaj revoj de propra memo estas ŝia temaro, sed male la zorgoj de la mondo, ne nur amo seksa aŭ familie orientita, sed ĝi transpasas la limojn de ŝia personeco. En tiu ĉi libro poezias mem la vivo. /Rimarkigo de la redakcio: La aŭtorino dediĉis al Literatura sekcio certan kvanton da ekzemplaroj de siaj verkoj: Facetoj kaj Divershumore. Kiu havas veran intereson, skribu al la Literatura sekcio, la verkoj estas riceveblaj/

## K I U D O P R A V A S E L D U , k i u j l e g i s m a l e l a s a m a n l i b r o n ?

Pravas ambaŭ. Mario Sola prijuĝas la libron el vidpunkto de la komunara, populara, konversacia, publi-cista stilo kaj nivelo de la lingvo Esperanto. Tiun stilon regas la regulo "Necese kaj sufiĉe". Ju malmulte da nekonataj vortoj ni uzas, des pli bone ni verkas. Oni de ne uzas sinonimojn, evitas neologismojn ktp. Entute bona postulo kaj inklino por la praktika uzo de la lingvo en normala vivo.

Sed se oni prijuĝas la poezion laŭ tiu ĉi stilo kaj nivelo lingva, ni faras gravan eraron. Apud la stilo komuna ekzistas stilo faka, tiun ni trovas en verkoj teknikaj kaj sciencaj. Tie ĉi validas la regulo "koncize kaj precize". Ĉiun vorton oni devas precize difini, ne uzi ĝin nur kiel ĝeneralajo. Se iu esperantisto volas legi la scienc-teknikan verkon, devas ellerni precizajn terminojn, kiuj apartenas en sferon de la zoologio, mineralogio, botaniko kaj de la tekniko. Oni ne povas kritiki la aŭtoron, ke li malbone verkas, verkante en preciza stilo scienc-teknika. Ne, leganto devas mem lerni por kompreni.

Kaj nun la fakto, ke ekzistas la stilo literatura, poezia. Mem la sciencistoj-teknikistoj en Esperantujo malaprobas tiun stilon, anatemas tiun nivelon de la lingvo. Ili volas ĝin anstataŭigi per la stilo komuna. Do: verku vian poeziaron en la stilo komuna, ke ĉiu profano komprenu. Kia sensencaĵo. La stilo poezia kaj literatura /esea/ akceptas kiel fundamenton la devizon: redunde kaj abunde, riĉe, nuance, metafore. Ne parolu ĝenerale, sed ĉiam konkret. Do oni povas nur en komuna stilo paroli "malĝanulejo"; en la stilo literatura oni devas scii konkrete indiki, ĉu ni parolas pri lazareto aŭ pri hospitalo aŭ pri sanatorio aŭ pri kliniko. Nur en stilo komuna oni povas paroli pri la "birdo"; poeto parolas pri la alaŭdoj, kornikoj, paseroj, najtingaloj ktp. Oni ne parolas nur pri "arbo"; la poeto devas konkrete indiki la specion de la arbo: pinio, saliko, siringo, pino, fago. La birdoj ĉe la poetoj ne nur "kantat", ili ĉirpas, kontrabasas, veas, zumas, grumblas, raspas ktp. Oni ne uzas por nocio "bela" nur tiun ĉi vorton; oni devas uzi multajn kaj variajn sinonimojn, kiuj delikate diferencigas inter variaj gradoj de la belo kaj malbelo. Resume: en la komunika stilo oni povas paroli: "Sur la arbo sidas la birdo kaj kantat" - fakte kaj tute sufiĉas-por la limigita praktiko - uzi la abstraktaĵojn, sed la poeto kiu fakte poetas, minimume diros, ke "sur la siringo hejmas la najtingalo; ĝi ame vokas". Kiom da novaj vortoj postulas la poezia stilo! Jes, se oni volas legi la poemojn kaj kompreni, oni devas senĉese pliriĉigadi stokon da vortoj. La poeto parolanta en komunaj vortoj estas poetaĉo.

Kaj ankoraŭ pli komplika estas la lingvo de la poeto. Li devas krom la stilo komuna, scienc-teknika /faka/ kaj poezia respekti ankoraŭ la stilon, kiun oni povus nomi "vulgara". Tio estas la stilo de la homoj parolantaj dialekte, argote, jargone, slange. Tradukadi tiun stilon simple per la stilo komuna estas falsado de la originalo, estas grava argumento kontraŭ Esperanto ĉar tiel ni montras ke nia lingvo ne kapablas reprodukti la tekstojn el nacia lingvo sur variaj niveloj, sed nur sur unu ĝenerala, abstrakta, nekonkreta nivelo komunik-parola.



Ni vere rekomendas al ĉiuj legantoj alproprigi al si la eseon de Josef Rumler titolita "Redunde kaj a b u n d e", kiun eldonis Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Prago 1986. La eseo estas literatura suplemento al revuo Paco, Ĉeĥa eldono. Tie vi trovos precizan analizon de la problemoj supre indikitaj.

Jiří Karen

### Kooperativa agado

Sur kooperativa "kampo" /kaj tio ne nur sur la agrikultura, sed sur diversentreprene/ ni komencis agi dum la 8 - 10-a de decembro. Tiam okazis la II-a konferenco de esperantistoj - kooperativanoj.

Kvankam la renkontiĝo ne estis multnombra, tamen ĝi estis grava. Substrekiĝis, ke la "kooperativan flagon" supre tenas la hungaraj kooperativanoj /kaj kooperativistoj/, kies autobuso, kun 16 partoprenantoj, "grimpis" el hungara ebena en montaron "Hostýnské vrchy". Post ili certe viglas la kooperativa afero en Pollando, kiel pruvis 4 polaj delegitoj. La nombro de la ĉeĥaj kaj slovakaj kooperativanoj spegulas malviglan kooperativan agadon /komprenu: inter la esperantistaro/ en niaj regionoj. Sed ĉefe pro tio ni konferencis: lerni reciproke, unu de la alia, transdoni spertojn kaj trovi pli efikajn vojojn por disvastigi ĉi agadon.

Nin ĉiujn ankaŭ instigis nia ekskurso en la Agrikultura Kombinato de la Kooperativo SLUSOVICE /tio dumtage/ kaj la folkloro muzik- + danc-grupo el Vracov /tio dumnokte/.

Organizanto ing. František H a v l í k scipovas organizi ĉi aranĝojn, car li posedas du efikajn rimedojn:

1. perfektan organizkapablon + esperantoscion
2. eblon gustumigi per specimenoj de vinoj el kooperativo Ĉejkovice.

Se oni kunigas ĉi du "internaciajn lingvojn", certe ni iros al sukceso ankaŭ en la kooperativa agado.

Menciinda estas la helpo, kiun donis al ni la Centra Komitato de 1 Agrikulturaj Kooperativistoj: ĝia ripoz-domo RUSAVA estis al nia dispono. Ni kredu, ke tio estas la komenco de nia oficiala kunlaboro kun tiu ĉi instituto.

ing. Turková

---

La 13-an de majo la pragaj esperantistoj adiaŭis s-aninon Ludmila KRÉSINOVÁ, kiu mortis subite la 5-an de majo 1989 en aĝo de 61 jaroj. En la antaŭa komitato de la klubo ŝi estis kasistino, krome ŝi instruis en la elementa kurso. HONORON AL SIA MEMORO!

En januaro 1989 forpasis membrino de E-klubo Dĉĉín, s-ino Jana ČERNÁ. Mi kondolencas al sia edzo kaj tuta familio.

# sporto

## GRANDA PREMIO DE BRNO

La 1-an de aprilo 1989 en Brno okazis veterana nag-kvarbatalo pri la Granda premio de Brno. La konkuro okazis en la granda 50-metra baseno Lužánky en Brno. En la nag-kvarbatalado partoprenis grandombraj nagantoj el Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario kaj Pollando. Inter la ĉeĥoslovakaj reprezentantoj estis nombraj elstaraj nagantoj, ekz. la venkintino de Manika Kanalo Lída Jelinková el Pardubice, d-ro Vítězslav Svozil, eksmondĉampiono en 100 m brustnagado ktp. En la veterana nagbatalo partoprenis ankaŭ sanideano Ing. Jaroslav Liška (Bohemians Praha), kiu gajnis en sia agogrupo (65-69 jaroj) la unuan lokon (oran medalon).

## La Dua Veterana Nagado en Kralupy/Vlt.

La 4-an de marto 1989 okazis en Kralupy/Vlt. la dua printempa veterana nagbatalado. En la konkuro partoprenis genagantoj de jenaj nagkluboj: Blau-Weiss Gersdorf (GDR), Chemička Ústí/L., Spartak Roudnice/L., Poldi Kladno, Bohemians Praha, IPS Kralupy/V., kaj Kaučuk Kralupy/Vlt. Plej multe da nagantoj startis en 50 m da libera maniero: 23! La plej maljuna naganto havis 80 jarojn.

En la veterana nagbatalado en Kralupy/Vlt. partoprenis ankaŭ s-ano Ing. Jaroslav Liška (Bohemians Praha), kiu gajnis en sia agogrupo (65-69 jaroj) la unuan lokon en 50-metra doragnagado (0:51,4 s) kaj en 50-metra brustnagado (0:54,4s); li gajnis ankaŭ la duan lokon en 50-metra papilio-nagado (0:55,5 s) kaj la trian lokon en 50 m da libera maniero (0:41,4 s). Gratulon!

## ĈINAJ LIBROJ EN PRAHA

Vendoekspozicio de ĉinaj libroj, eldonitaj en kelkaj mondlingvoj inkl. Esperanton, okazis en aprilo. La esperantlingva parto entenis ĉ. 15 verkojn, bele ilustritajn per koloraj bildoj kaj fotoj (plejparte fabeloj, plus pejzagoj, ĉina kuirarto k.a.). La nevendita resto estas ricevebla en Zahraniční kniha, Václavské nám., průchod Alfa jm.

---

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Karel FRANC, Jiří HANOUSEK (grafika arango), Ing. Vlastimil KOČVARA, Miroslav MALOVEC, Jiří PATERA (respondeca redaktoro) kaj Helena ŠTRUNCOVÁ. Presas Servo-entrepreno de urbo Liberec. Transdonita al presejo 1989-05-31. Jarabono 36 CSK, por eksterlando 48 CSK au 14 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA au rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Karel FRANC, Jiří HANOUSEK (grafická úprava), Ing. Vlastimil KOČVARA, Miroslav MALOVEC, Jiří PATERA (odpovědný redaktor) a Helena ŠTRUNCOVÁ. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18. 3. 1985. Tiskne Podnik služeb města Liberce. Předáno do tisku 31. 5. 1989. Dohlédací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povolen ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.



# KORESPONDI JEZIROJ ANONCOJ

Volas korespondi: Georgi Cvetkov,  
ul. Oplenska 23, 9000 Varna, Bulgario.

20-jara junulo deziras korespondi kun  
junaj leteramikoj el Ĉeĥoslovakio.  
Adreso: Sven Sychalski, Ackerstr. 1,  
Gräfenhainichen, 4450 GDR.

17-jara studentino de la Kaliningrada  
teknika lernejo studas lingvojn anglan  
kaj Esperanton, kolektas postmarkojn.  
Adreso: Elena Maaljonok, str.  
Mariupolackaja 16-20, Kaliningrad,  
SU-236006, USSR.

Studento, membro de taŝkenta E-klubo,  
volus korespondi kun gee-istoj de Ĉeĥo-  
slovakio, interesigas pri literaturo,  
tekniko, naturo, fremdaj lingvoj, histo-  
rio, internacia vivo, E-movado kaj aliaj  
temoj: Vladimir Vinogradov, USSR-700167  
Tashkent, ul. Zelenaja, 38, CCCP.

43-jara historiistino kaj historiistino  
de artoj, vivanta sola, tre interesigas  
pri Ĉeĥoslovakio, pri siaj tradicioj,  
moderna vivmaniero, idealoj, urboj, na-  
turo kaj homoj, si tre interesigas pri  
tradicia kulturo de Magribujo (precipe  
de urbo Feso en Maroko), pri la kulturo  
de Islamo, pri la aliaj tradiciaj kultu-  
roj (de kristanismo, de taoismo, budhis-  
mo, hinduismo), pri instruoj de Karloso  
Kastanedo, si interesigas ankaŭ pri mu-  
ziko, poezio, turismo, si volus havi a-  
mikojn kaj korespondantojn en Ĉeĥoslo-  
vakio. Adreso: USSR, 141730,  
Moskovskaja obl., g. Lobja, ul. Lenina  
43, kv. 38, Nina Lokman.

17-jara lernantino interesigas pri li-  
teraturo, kolektas bk, kalendarotojn,  
volas korespondi tutmonde pri ĉiuj te-  
moj: Nomsda Vilkelytė, 235000 Jonava,  
Chemikų 35-6, Litovio, USSR.

21-jara fraŭlino dez. kor. tutmonde pri  
belarto, muziko, turismo, literaturo,  
naturo, bestoj kaj p.ĉ.t. Adreso:  
Vilma Bukauskaite, Karlo Markso str.  
226/34, Kaunas, 233000, Litovio.

22-jara fraŭlino dez. kor. tutmonde  
p.ĉ.t. kol. BK. Ulozaitė Jūratė  
Marių 101, Rumsiskės, Kaisia Doris Ra-  
jono, Litovia Respubliko.

24-jara fraŭlino dez. kor. tutmonde  
p.ĉ.t. kol. BK. Loreta Jotautienė  
Šiaurės Pr. 6/40, Kaunas 233000,  
Litovia Respubliko.

23-jara fraŭlino dez. kor. tutmonde  
p.ĉ.t. kol. BK. Rima Skrodonytė. Rokai.  
Aviscių 28. Kaunas. Litovia Respubliko.

19-jara fraŭlino dez. kor. tutmonde  
p.ĉ.t. kol. BK. Rudytė Rūta, Taikos Pr.  
37/60, Kaunas, Litovia Respubliko.

25-jara sinjorino dez. kor. tutmonde  
pri turismo, psikologio natura kaj p.ĉ.t.  
Audra Rukšėnienė, Čeraiakovio 137/403  
Kaunas, Litovia Respubliko.

21-jara fraŭlino dez. kor. tutmonde p.ĉ.t.  
kol. BK. Afrodītė Zagurakytė,  
Vilniaus G-vė 6/2, Kaunas, 233000  
Litovia Respubliko.

27-jara nova esperantistino dez. kor.  
tutmonde pri popola arto, manlaboroj,  
turismo, kolektas bildkartojn, suveni-  
rojn. Adreso: Iaima Alsaukienė,  
Kosmonautų 20-19, SU-235000 Jonava,  
Litovio, USSR.

26-jara instruistino interesigas pri tu-  
rismo, fotografado, fremdaj lingvoj,  
kolektas bildkartojn kaj postmarkojn.  
Adreso: Gražyna Malezka, Ul. Solna 7/57,  
43-300 Bielsko-Biża, Pollando.

Kajero de Panoramo 1978 (literatura al-  
manako de Starto) "Intima Triptiko" de  
Rudolf Hromada estas sercata. Kiu povas  
vendi ĝin, skribu al Eli Urbanová,  
Velešlavinská 47, 160 00 Praha 6.

44-jara virino interesigas pri oio. Ŝia  
adreso: Anna Sydzio, Krakow 49,  
Al. Pokoju 33, skr. pocz. nr. 8,  
Pollando.

**Český esperantský svaz  
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

**NOVINY**

**Dohlédací pošta Praha 07**  
**Snížený poštovní poplatek povolen**  
**Ředitelstvím pošt Praha**  
**J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979**